

Germana Esperantisto

kun

Esperanto-Praktiko

Oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio — (G.E.A.) — kaj de aliaj Esperantistaj Unuiĝoj
Amtliches Blatt des Deutschen Esperanto-Bundes E. V. und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Elvenas en la komenco de ĉiu monato.
Abonprezoj kaj prezoj por anoncoj estas ŝanĝeblaj; ili estas speciale publikigataj sur la unua kovrilpaĝo de ĉiu numero.



Erscheint zu Anfang eines jeden Monats.
Bezugs- und Anzeigenpreise sind veränderlich; sie werden auf der ersten Umschlagseite jeder Nummer bekanntgegeben.

Fondinto: J. Borel — Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek — Respond. redaktoro: Arnold Behrendt
Alsenditajn artikolojn ni korektas laŭ bezono. Nepresitajn manuskriptojn ni resendadas nur, se oni aldonis afrankajojn por tio.

21 a Jaro No. 2 (336)

Eldonejo kaj redaktejo: Berlin SW 61, Wilms-Str. 5

Februaro 1924

Marie Hankel 80-jara!

Por la Dresden-a Esperantistaro, por multaj rondoj de la germana, eĉ por tiu de la tuta terglobo, la Februaro en tiu ĉi jaro alportas festotagon, tagon de enpensigo, de kunvibro de l' animo. Al *Marie Hankel* estas permesate, la 2an de Februaro 1924

rerigardi sur 80 vivojarojn, kuraĝe kaj forte portitajn.

Ŝiaj agado kaj vivo montras la maloftan bildon de interfandiĝo de la Esperanto-ideo kun la profundaj inklinoj, opinioj, plej personaj fortoj de entuziasma virinamino.

Ankoraŭ nun, hodiaŭ, la anima koncentriĝo, la aranĝo de l' tago, la interkomunikiĝo kaj domo de Marie Hankel apartenas al la progresigo kaj evoluigo de Esperanto. Esperanto-sonoj tuj trafas la vizitanton, sur laboro-tabloj li vidas Esperanto-librojn, -skribaĵojn, -manuskriptojn, -leterojn ĉiutage alvenantajn

ofte el grandaj malproksimoj. Oni renkontas eksterlandajn gastojn, kiuj petas konsilon, oni aŭdas de la sinjorino de l' domo afablajn kaj interesajn sciigojn pri direktoj kaj progresoj interne de la Esperanto-movado, pri la Esperantista Literatura Asocio, fondita kaj ĝis antaŭ nelonge prezidita de ŝi. Ankaŭ

privatajn informojn ŝi donas pri libroj kaj korespondado, kiun ŝi, eĉ ne konsiderante sian sanstaton, ofte mem plenumas.

Aplikante resuman esprimon oni diru, ke oni sentas la domon kaj mondon de Marie Hankel kvazaŭ unu el la batantaj koroj en la Esperanto-organismo, ĉirkaŭtenanta la terglobon.

Kio estis, kio estas ĉe Marie Hankel la interna risorto por ĉi tiu laborĝoja vivo, servanta al la Esperanto-movado?

Kun firma interna forto ŝi kredas je la bono en la mondo, kredas, laŭ oftaj konstatoj per skribo kaj parolo, je feliĉigoj al aliaj kaj je la propra persono per agado en la senco de altpensa homaranismo; ŝi tial kredas al la Esperanto-ideo kaj ĝia estonteco. Esperanto volas — ĉiam denove ni memoru tion — esti ne sole praktika, teknika, sed ankaŭ interne homa afero. Ĝi volas servi al anime spiritaj valoroj, ĝi volas —

kunigi, interligi la homojn.

Je la malofta festotago la germanaj Esperantistoj salutas sian naskiĝtagulinon kun danko kaj koraj deziroj por interne riĉaj estontaj jaroj, por plua ĝoja vivado!

J. Zschepank

Ni rekomendas: *Sableroj*, originalaj poeziaĵoj kaj skizoj de Marie Hankel, de kiuj ni ankoraŭ havas malgrandan provizon.
La eldonejo.



La urbo de la XVIa

Pri kio ni en Wien revis de post la glora Bulonja Kongreso, kion ni ne plu kuraĝis esperi dum la terura milito tutmonda, tio en la jaro 1924 efektiviĝos. Wien invitas la tutmondan Esperantistaron al la Dek-sesa Universala Kongreso, okazonta inter la 6a kaj la 14a de Aŭgusto.

Ni esploru sen revemo kaj senpartie, ĉu la geografia, la kultura kaj la Esperantista situacio de Wien pravigas, elekti ĝin kiel kongresurbo.

La historio de Wien reflektas ĝis la imperio de Rom. La tiutempa Vindobona estis la Rom-a bastiono kontraŭ la nordaj — ankoraŭ barbaraj — popoloj, same kiel ĝi poste fariĝis remparo kontraŭ la sovaĝaj orientlandaj popoloj. Dum la mezaj centjaroj ĝi estis la ĉefurbo de la „Rom-a Imperio de Germana Nacio“, kaj post la ekziĝo de Aŭstrujo el la germanaj federitaj ŝtatoj ĝi restis la metropolo de la Aŭstruja monarkio, pli kaj pli kreskante laŭ spaco, laŭ loĝantaro kaj laŭ signifo kiel sidejo de la muzoj kaj de la sciencoj.

Spirego de la universa historio forblovis monarkiojn, sed jen, restis la unika urbo apud Danubo, la urbo, sur kies teritorio mortis la filozofo sur la Rom-a trono, Marc Aurel, urbo, inter kies muroj kantis trubaduroj de la Mezepoko: en Wien vivis kaj verkis la plej gravaj muzikkomponistoj, kaj en Wien studis nia glora majstro Zamenhof dufoje dum kelke da tempo de lia kuracista vivo. Kion diras Goethe? „Loko, kiun nobla hom' eniris, restas sankta por ĉiama tempo!“

Silentu, sentadoj, restu malvarma, cerbo! — La prognozo de pesimistoj pri la sorto de Wien post la militfino estis erara, ĉar ili forgesis la situacion de Wien. Tiu ĉi urbo estu aŭ ne estu politike la ĉefurbo de potenca ŝtato: efektive ĝi estas kaj restos la centro de Eŭropo. En la longmezo de Danubo ĝi estas la ponto inter la orientaj kaj la okcidentaj landoj. En la fino de Alpoj ĝi estas la pasejo inter suda montaro kaj nordaj ebenaĵoj. Kapstacio de la plej gravaj fervojoj, ankaŭ post la politika ŝanĝo ĝi restis la ĉefa ligilo inter ĉiuj partoj de la kontinento.

Ĉe la bordoj de Danubo amasiĝas en Wien la naturproduktaĵoj el la orienta kaj la sudorienta Eŭropo, por disiri al la landoj de la nordo kaj de la okcidento. Enfluadas la materialo kaj la duonfabrikaĵoj el ĉiuj landoj, kaj Wien-a laboremo, Wien-a bongusto finpretigas ilin, Wien-a komerca spirito eksportas ilin. Regas diligento, agemo, industrio en Wien nun, same kiel dum ĝiaj plej feliĉaj tagoj. —

Kaj la sciencoj? Wien ja estas la urbo de medicina skolo fama tra la tuta mondo, kie efikas Hyrtl, Rokitsky, Billroth, Nothnagel kaj multaj aliaj korifeoj. Kaj la artoj? En Wien vivis kaj verkis majstroj de la muziko: Mozart, Beethoven, Schubert, Brahms, Bruckner k. c., verkis majstroj de la peniko: Makart, Canon, Blaas, majstroj de la arkitekturo: Schmied, Ferstel, Hansen, kiuj riĉe ornamis per majestaj konstruaĵoj la strataron kaj la placaron, majstroj de la skulptarto: Donner, Zumbusch k. a., kaj majstroj de la scenejo: Sonnenthal, Lewinsky, Kainz, verkis majstroj de la poezio: Grillparzer, Raimund.

Nur kelke da karakterizaj nomoj, kaj post ili amaso da heroldoj el ĉiuj kampoj de plej alta kulturo!

Plue la multaj gravaj kolektoj ĉiuspecaj de artobjektoj, la galerioj de pentraĵoj, la muzeoj de la ŝtato kaj de la urbo kaj de la privatuloj kun sia abundo de trezoroj multekostaj kaj ravaj, la multaj artoplenaj preĝejoj kaj palacoj — vere, Wien estas vidinda unuarange.

Kaj super tiu ĉi urbo ŝvebas dia varmeta spiro kaj maturigas la fruktojn, levigas la korojn, batigas la pulsojn. Iru sur la monton Kahlenberg kaj rigardu la ĉirkaŭaĵon! (Grillparzer.) — Kia pejzaĝa juvelo, de la arĝenta riverego ĝis la neĝaj deklivoj de Alpoj — unu vasta paradizo. La maro de ŝtonaj domoj, jen kaj jen interrompita per ĝardenoj kaj parkoj, kies plej granda kaj plej fame konata estas „Prater“, kaj de tempo al tempo ĉiam denove elkreskas ĝardenoj — malnovaj tombejoj aliĝas je vivaj ripozejoj kaj ludejoj — kaj ĉirkaŭ la vastetenda urbego tute proksime arbaroj kaj herbejoj: vera aerujo por la loĝantaro, mildiganta la klimaton de alialoke teruraj someroj.

Neniam iu Universala Kongreso de Esperanto estis ankoraŭ en tiom grandega, sed ankaŭ neniam en tiom histori plena kaj tamen moderna, industri-riĉa kaj tamen romantika, malgraŭ multe da fabrikejoj belega urbo. Urbo de fieraj palacoj kaj de amindaj barakoj, ĉirkaŭ kiuj ŝajne senrevaj urbanaj plantas ne nur brasikon por nutro, sed ankaŭ florojn, urbego, en kies interno bruas la modernaj veturiloj kaj kiun ĉirkaŭas trankvilo de kampoj: vi estas fabelo efektivigita en proza tempo, kaj tial al vi apartenas Esperanto, ankaŭ fabelo, realigita en malesperanta tempo!

Sed, silentu sentado, silentu! —

Kaj la popolo? — De la nordaj najbaroj ĝi heredis la laboremon, la amon al scienco, la energion kaj la persistecon, de la sudaj la fantazion, la amon kaj la talenton al artoj. Wien estas la ĉefa loko de la unua sukcesplena internacia lingvo: la muziko, kaj la Wien-a teatra arto de pli ol cent jaroj estas modela por la tuta mondo.

Konsiderante la geografian, la kulturan kaj ankaŭ la Esperantistan situacion de Wien, la Loka Kongresa Komitato aranĝos la Kongreson kiel grandiozan internacian manifestacion por la interna ideo de Esperantismo. Ĝi preparos seriozan prezentadon teatran, aŭdigos Wien-an muzikon kaj ĝuigos la veran Wien-an bonhumoron faman en la tuta mondo. Ĝi klopodos pravigi la publikan opinion pri la gastameco de Wien — ho, venu do la gastoj! Venu ili grandamase; jam hodiaŭ ni vokas:

Koran bonvenon en la jam elpruvita kongresurbo Wien!

Otto Simon,

2a prezidanto de la Loka Kongresa Komitato

**Sendigu al vi tuj
aligilon por Wien!**

Rememoroj el 1903

La sciigo, ke la Berlin-a Esperantistaro baldaŭ festos*) la 20an datrevenon de la fondo de la unua Esperantista grupo en Berlin, vekas en mi karajn, sed iom melankoliajn rememorojn. Laŭ la deziro afable esprimita de fraŭlino Hildegard Nickel mi kun plezuro volas klopodi, resumi kelkajn memorojn, kiuj restis al mi el la jaro 1903.

Mi estis Esperantisto de proksimume du jaroj, kiam mi dum la monato Majo de tiu jaro vojaĝis el Svisujo al Berlin kun celo parte Esperantista, sed ne sciante ankoraŭ, ke mi tiom da tempo okupiĝos pri la afero en Germanujo.

Dum la travojaĝo mi vizitis en Konstanz la tiam ankoraŭ vivantan abaton *Schleyer*, la elpensinton de Volapük. Pri tiu vizito mi jam raportis aliloke, sed por mi pli gravan personon mi deziris vidi, nome nian majstron D-ron *Zamenhof* en Varsovio, kaj mi efektivigis tiun planon malmulte da tempo post mia unua restado en Berlin. Mi parolos pri tio.

Kiu estus kredinta, ke antaŭ 14 jaroj Germanujo estis la lulilo de Esperanto dum la tempo de la meritplenaj pioniroj Einstein kaj Trompeter? En la printempo de 1903 ekzistis nur tre malmultaj Esperantistoj en Germanujo, eble 20. Mi haltis en München por viziti unu el la plej malnovaj, s-ron *Ludwig Emil Meier*, kiu estis eldoninta lernolibron, sed ne sukcesis vendi ĝin pro manko de intereso. Li ankaŭ fondis en München grupon, kiu vivetis kelkan tempon kaj mortis.

En Berlin mi havis la plezuron, renkonti kvar fervorajn Esperantistojn, nome nian eminentan samideanon D-ron *Schmidt* el Potsdam, direktoron *Wetekamp* kaj du agemajn junulojn: s-rojn *Maurice Pagnier* el Paris, kiu tiam studadis en Berlin, kaj *Hermann Jürgensen*. En tiu tempo ankoraŭ estis en Berlin s-ro *Fried*, la konata propagandisto de la paca movado, kiu, kvankam nesperta Esperantisto, estis eldoninta malgrandan Esperantan lernolibron, sed tuj poste li forloĝiĝis al Wien.

Kun tiuj sinjoroj mi preparolis la demandon pri vekigo de intereso por nia lingvo en Germanujo per estigo de Esperanta centro en Berlin por kunigo de la samideanoj disaj en la imperio. Efektive, tre malgranda estis ilia nombro, sed la jamaj sukcesoj de Esperantismo en aliaj landoj, nome en Rusujo, Polujo, Svedujo, precipe la tre vigla movado en Francujo, ŝajnis promesi sukceson ankaŭ en Germanujo.

Tamen aŭdiĝis senkuraĝigaj voĉoj, kiuj antaŭdiris, ke Esperanto neniam prosperos en Germanujo, ĉar en tiu lando la malsukceso de Volapük lasis pli ol aliloke malfavoran impreson pri la ideo de lingvo internacia. Kelkajn monatojn antaŭe prof. *Carlo Bourlet* el Paris, plej lerta propagandisto en Francujo, estis farinta rondvojaĝon en Germanlando por trovi eldoniston pretan kunlabori kun la potenca

*) Bedaŭrinde la ĉi-supra artikolo ne povis esti publikigata pli frue pro manko de spaco en nia gazeto. Ni opinias, ke eĉ nun ankoraŭ la rememoroj de s-ro Jean Borel havas intereson por nia legantaro, ĉar la nomoj cititaj de li parte apartenas al Esperantistoj, kiuj ankaŭ nuntempe ludas gravan rolon en la Esperantista movado. Fiksi li an sintenadon laŭ la diro de s-ro Jean Borel, ŝajnas al ni honora de vo. Krome la rememoroj montras, kvankam nur per malmultaj modestaj vertoj, kiu rolon antaŭ 20 jaroj ludis s-ro Jean Borel mem. la fondinto de nia gazeto. La germana Esperantistaro ĉiam restos ŝuldanto al li. Red.

librejo Hachette & Co. por la vastigado de bonaj lerniloj Esperantaj en ĉiuj landoj, laŭ favoraj kondiĉoj kun financa apogo de tiu firmo, sed li vane klopodis. En Berlin kiel en Leipzig kaj aliaj urboj ĉiuj eldonistoj rifuzis okupiĝi pri lingvo internacia, asertante, ke ĝi neniam estos populara afero.

Sen taŭgaj lerniloj kaj propagandiloj por Germanoj Esperanto kompreneble ne povis progresi, kaj laŭ opinio de D-ro Zamenhof mem la du ekzistantaj lernolibroj estis pli danĝeraj ol utilaj, ĉar ili enhavis „terurajn erarojn“.

La unua senerara libreto estis eldonata de Hachette en Paris kaj titolita „Anfangsgründe der Esperantosprache“; ĝi estis tre bona verketo de s-roj *Cart* kaj *Pagnier*, sed ne sufiĉe detala. Krome mankis vortaroj, ekzerclibro, klarigaj broŝuroj por efika propagando, kaj ĵurnalo por Germanoj.

Tiam venis al mi la ideo, ĉar neniu eldonejo por tiuspecaj libroj konsentis publikigi Esperantajn verkojn, ke iu alia firmo povus ĝin fari, kaj mi proponis al mia frato *Jules Borel*, entrepreni la aferon. Li tiam havis sub firmo *Möller & Borel G. m. b. H.* en Berlin presejon kaj eldonejon por verkoj pri higieno ktp., kaj li respondis, ke li akceptos kondiĉe, ke mi restu en Berlin por okupiĝi esence pri la Esperanta eldonado, ĉar li mem ne havas tempon por tio. Mi konsentis kaj baldaŭ komencis labori, sed intertempe mi devis reveturi Svisujon por ordigi miajn aferojn kaj pretiĝi por daŭra restado en Berlin.

Je la sama tempo mi ankaŭ vizitis D-ron Zamenhof en Varsovio. La horoj pasigitaj kun li tiam lasis al mi neforgeseblan impreson. Precipe plaĉis al mi lia praktika lingva sento, lia alta idealismo, kunligitaj kun perfekta modesteco. Kia diferenco kompare al la aroganta sintenado de abato *Schleyer*! Ni tagmanĝis kaj pasigis parton de sabata posttagmezo parolante pri ĉio, kio koncernas la lingvon kaj la Esperantan aferon, en lia malnova loĝejo de Ulica Dzika n-o 9, kaj la sekvanta tagon ni revidis nin en kampara dometo, kie vivis lia familio dum la somero. Tie mi konatiĝis kun s-ino *Klara Zamenhof* kaj la du pli aĝaj infanoj.

Estis vera ĝuo por mi, interparoli Esperante kun nia tiel simpatia majstro kaj konstati, ke ni interkompreniĝas bonege, ĉar ĝis tiam mi ne estis parolinta kun tre spertaj Esperantistoj. Li havis la afablecon diri al mi, ke mia elparolo estas bona, kaj ke li ĝojas pri tio, ĉar mi estas la dua fremda (nepola kaj nerusa) Esperantisto, kun kiu li parolas, kaj ke la unua estis franca inĝeniero, kiu vojaĝis Rusujon kaj ne havis korektan akcenton. D-ro Zamenhof nepre kuraĝigis min pri la eldono de Esperantaĵoj en Germanujo, dirante, ke li helpos laŭ sia povo kaj estas preta verki vortaron Germanan-Esperantan kaj revidi mem antaŭ presado ĉiujn de ni eldonotajn verkojn.

En Varsovio mi ankaŭ vizitis D-ron *Kazimir Bein*, novan Esperantiston, kiu kelkajn jarojn poste fariĝis nia plej fama verkisto sub pseŭdonimo Kabe. Li ankaŭ estas okulkuracisto kiel D-ro Zamenhof.

Mia unua laboro post reveno al Berlin estis la verkado de klariga broŝuro titolita „Die Frage einer internationalen Hilfssprache und das Esperanto“ kun mallonga resumo de gramatiko kaj vortaro. Poste venis propaganda folio kaj la grava demando pri praktika lernolibro, kiun oni urĝe bezonis. Mi

decidis verki ĝin laŭ la bonega metodo de prof. Cart „Esperanto en dek lecionoj“, sed pli detale laŭ klarigoj, ekzercoj kaj ekzemploj. Pli poste ni okupiĝis pri vortaro Esperanta-Germana, dum monatoj Hermann Jürgensen kaj mi dediĉis ĉiun vesperon al la verkado de la manuskripto, kiu estis sendata al D-ro Zamenhof por fina revido.

Provizitaj per la plej bezonata propagandilaro, ni povis komenci labori efike. Je la fino de Novembro 1903 okazis kunvenoj de ĉiuj Esperantistoj en Berlin por pristudi la organizon de grupo. Ili estis kunvokitaj en la ejoj de la novfondita Esperanto Verlag Möller & Borel, Prinzenstraße 95, kelkaj havis lokon en domo de nova fervora samideano D-ro *Adolf Mehlisch*, Steinmetzstraße. Ĉe estis s-roj prof. Schmidt, D-ro Wetekamp, gesinjoroj Mehlisch, H. Jürgensen, mia frato Jules Borel kaj mi.

La fondiĝo de la grupo okazis sub aŭspicioj de la Berlin-a sekcio de la Paca Societo, al kiu apartenis ĉiuj ĉi supre cititaj personoj. Aliĝis ankaŭ aliaj neesperantaj membroj de la Paca Societo, interalie la prezidanto D-ro *Herter* kaj kelkaj sinjorinoj, kiuj fariĝis anoj nur pro konvinko, ke lingvo internacia povas utili al la paca movado, sed sub la kondiĉo, ke ili ne lernu ĝin... Ni promesis, ke ni ne tedos ilin.

La pretigo de la grupaj statutoj estis longa laboro, kiu daŭris tri vesperojn, ĉar la respektinda D-ro *Herter* estis metoda, preciza homo, kiu ne kontentiĝis per supraĵa laboro. Kiel modelon oni prenis la regularon de la Paca Societo kun la necesaj modifoj kaj fine dum Novembra vespero, kies ekzaktan daton mi ne plu memoras, la Esperantista Grupo Berlin (Esperantisten-Gruppe Berlin) estis fondata. Prof. Schmidt bonvolis akcepti la prezidantecon, kaj la oficiala sidejo estis ĉe la Esperanto Verlag, Prinzenstraße. Kiel organon oni alprenis mian malgrandan folion „Esperantistische Mitteilungen“, kiu post kelkaj monatoj fariĝis „Germana Esperantisto“.

Kiel oni povas imagi, la komencoj de tiu gazeto, kies jara abono kostis nur 1.50 M, estis modestaj: nur dudeko da abonantoj! sed tio reprezentis proksimume la tutan germanan Esperantistaron. Maltima estis la unua paŝo, sed baldaŭ alvenis kuraĝigoj el diversaj urboj, nome Braunschweig (de s-roj *Wallon* kaj *Schuk*), Königsberg (de D-ro *Ebner*), Leipzig (s-ro *Mielk*), Wall. Meserisch (fraŭlino *Scheerpeltz*). Baldaŭ ankaŭ eksterlandanoj abonis nian ĵurnalon por subteni la movadon, precipe Francoj, Rusoj kaj Svisoj. Pli malfrue, dum la jaro 1904, aperis sur la scenejo viroj, kies nomoj brilis en la Esperanta ĉielo, kiel D-ro *Mybs* en Altona, prof. *Christaller* en Stuttgart, D-ro *Hanauer* en Frankfurt a. M. ktp.

Gratuloj de Esperantistoj el ĉiuj mondpartoj salutis la naskiĝon de la Berlin-a grupo. Ĉiuj esprimis la deziron, ke tiu unua serioza paŝo veku fervoron por Esperanto en Germanujo, kiu kompare kun la ceteraj eŭropaj landoj estis preskaŭ la lasta en tiu rilato.

La sukceso venis iom post iom kaj ĉiam pli rapide, precipe el la provinco, kaj la sidejo de la Berlin-a grupo baldaŭ fariĝis la centro de la Esperanta movado en Germanujo. Ĉiumonate alvenis pli kaj pli da leteroj kun demandoj pri sciigoj, pri klarigoj rilate al la lingvo kaj al la

tuta Esperanta afero, pruvo de ĉiam kreskanta intereso. Sed la de ni ĵetita semo pli rapide prosperis en la provinco ol en Berlin mem. Ni konstatis ĉiam, ke la progresoj en la ĉefurbo estas malpli facilaj ol en ĉiuj ceteraj urboj, kaj ke oni devas multe klopori por kapti la intereson de la Berlinanoj.

Ne mankis fervoro por la propagando. Nia sindona prezidanto prof. Schmidt faris multajn paroladojn en diversaj societoj: sciencaj, filantropaj, eĉ politikaj. Unu vesperon unuigo, kies celo ne estis al ni tute klara, petis paroladon de li pri Esperanto. Li venis kaj miris troviĝi sur la scenejo de granda restoracio inter du policanoj en uniformo, kiuj notis ĉiujn parolojn. Oni poste diris al ni, ke tio estis danĝera socialista unuigo, sed la polica oficiro ne longe malkvietiĝis pri la suspektindeco de nia kara prezidanto, kiu tre lerte kiel unuan provon de la lingvo deklamis la preĝon „Patro nia“.

Ankaŭ ofte parolis pri Esperanto prof. Wetekamp kaj paroladisto popola s-ro *Bab*. Kursoj estis aranĝataj en diversaj lernejoj, ĉu de prof. Schmidt, ĉu de mi mem. La partoprenantoj montris intereson, sed malgraŭe la grupano tre malrapide kreskadis. La gazetoj nevolonte akceptis artikolojn pri la lingvo internacia, tamen la malmultaj, kiuj aperis, bone efikis kaj venigis al ni grandan nombron da demandoj, interalie originala artikolo de la redaktoro *Gerling* en „Naturarzt“ sub la titolo: „Eine hygienische Sprache“.

Parolante pri miaj Esperantistaj rememoroj el la jaro 1903, mi ankaŭ devus menci la komencan movadon en Svisujo kaj 2 interesajn vojaĝojn en aŭstraj kaj hungaraj landoj kaj poste en Francujo kaj Belgujo, kie mi kun plezuro konatiĝis kun la ĉefaj pioniroj de tiuj landoj, sed mi ne volas troampleksigi tiun raporton destinitan precipe per la Berlin-aj samideanoj.

Konklude mi nur deziras aldoni, ke mi kalkulas la du unuajn jarojn de mia restado en Berlin por la vastigado de nia kara lingvo inter la plej belaj de mia vivo laŭ ideala vidpunkto. Mi opinias, ke la malmultaj homoj, kiuj ĉeestis la naskiĝon aŭ pli vere la renaskiĝon de Esperanto en Germanujo, estas privilegiuloj.

Esperanto estis tiam ankoraŭ nova, nekonata, kaj tiuj, kiuj konatiĝis kun ĝiaj mirindaj ecoj, havis la impreson, ke ili „malkovras“ ion. Tio kaŭzis entuziasmon, kiu komunikiĝis al la novaj adeptoj kaj plenigis ilin je fervoro por propagandi. Tiu ĝojo de la unuaj paŝoj abunde kompensis la penojn de la komenca semado. Tiam oni rikoltis pli da mokaj kritikoj ol nun, sed ankaŭ pli da kuraĝigaj atestoj.

Kia plezuro estis, ricevi leterojn el ĉiuj partoj de la mondo kun ĉiam la sama esperplena sento, kiu ajn estis la nacieco kaj la lingvo de la skribinto! Pli granda ankoraŭ estis tiu sento, kiam oni havis okazon, interparoli kun fremduloj kaj konstati, ke oni komprenas sin reciproke perfekte. Tio estis nova fakto, kiu ŝajnis preskaŭ mirakla. Efektive oni ne povas kompari la facilan Esperantan konversacion al la peniga, malrapida volapŭka interparolo, pri kiu mi memoris, ĉar mi lernis tiun

lingvon dum la jaroj 1886—1887, sed neniam sukcesis paroli ĝin iom flue nek aŭdkompreni facile iun parolantan.

Oni nun havis unufoje la klaran impreson, ke la problemo de lingvo universala estas definitive solvita, kaj ke la fina venko dependas nur de la fervoro de l' adeptoj.

Tiam ni ne pensis, ke du gravegaj, pereigaj danĝeroj baldaŭ minacos la naskiĝintan infanon: unu interna: la idista batalo, alia ekstera: la tutmonda milito. Nun dank' al Dio ambaŭ malhelpaĵoj estas venke travivitaj, kaj post dudekjara klopodo ni rajtas antaŭvidi denovan sukcesplenan periodon ĝis la fina venko.

Ni laboru kaj esperu!

Jean Borel

Resonado (Ĥho de Eko)

Mia intenco estis, en ĉi tiu numero daŭrigi la resonadon pri la Nürnberg-aĵoj, pri kiuj mi babilis en la antaŭa numero. Sed ĝuste en la momento, kiam mi volis komenci mian ĉadon — estis plej urĝa tempo por tio, ĉar la kompostist-lernanto jam staris atendante ĉe mia skribotablo por kunpreni la manuskripton — atingis min sciigo de s-ro Stay el Southbourne pri *Esperanta Radio-prezentado* komunikota la 31an de Januaro el Bournemouth (Anglujo). Jen signo de l' ĉielo, mi pensis, por — prokrasti la skribadon, aŭskulti la prezentadon kaj poste ĉi pri ĝi. Do mi forsendis la kompostist-lernanton, bone konsciante, ke la „respondeculo“ grumblos pri la mallaboremo de sia „ĉefo“. Sed pro kio mi estas ĉefo, se mi ne havas la rajton labori laŭ mia plaĉo? Krom tio mi pensis, ke la legantoj verŝajne ne estos malkontentaj, ekscii ion detalan pri la eventuala sukceso de la anoncita radio-telefona eksperimento. La kaŭzitan de tio prokraston en la elveno de ĉi tiu numero ili certe ankaŭ pardonos. Granda estis mia ĝojo, kiam la respondeculo, al kiu mi telefonis mian decidon, ne grumblis, sed eĉ konsentis pri ĝi, ankaŭ dezirante partopreni la aŭskultadon de la prezentado, tiom pli, ke antaŭa, simila eksperimento el Newcastle (Anglujo) bedaŭrinde ne sukcesis pro teknika eraro ĉe la forsendo de la parolado.

Sed la decido estis pli facile farita ol efektivigota. Kien ni turnu nin pro la aŭskultado? La forsendo kaj akcepto de privataj radio-paroladoj en Germanujo ankoraŭ ne estas ĝenerale permesitaj. Ankaŭ en Berlin ja ekzistas jam multaj privatuloj, kiuj instaligis al si radio-aparatojn por aŭskultado, sed tiuj aparatoj estas aranĝitaj nur por certa ond-longeco kaj ebligas nur la aŭskultadon de oficialaj aŭ oficiale permesitaj radio-komunikoj. Por suspekt-emaj eksterlandanoj mi aldonas, ke tiu malpermeso ne rezultas el politikaj cirkonstancoj, sed ĝia kaŭzo estas la kontraŭstaro de la germana telegraf-administracio, kiu ĝisplue volas konservi sian monopolon pri transigo de telegrafaj komunikoj. Sed G. E. feliĉe havas respondecan redaktoron, kiu en kromofico estas telegraf-direktoro; li sukcesis trovi fabrikan de radio-aparatoj (C. Lorenz A-G., Berlin-Tempelhof), kiu invitis nin, aŭskulti la anoncitan prezentadon en ĝia prov-stacio, troviĝanta en Dabendorf apud Zossen.

La prezentado, dissendota de la radio-stacio de Bournemouth kaj konsistonta el du kantoj kaj mallonga parolado esperantlingvaj, estis anoncita por la 8.30 h. vespere en la supre dirita tago. Sed la antaŭan tagon ni eksciis, je nia ĝojo, ke ankaŭ la 31an, je la 7.50 h. vespere, s-ro Pitlik el Praha faros radio-paroladon en Esperanto. Ni do povis „kapti du muŝojn per unu kaptilo“. Rapide ni informis kelkajn aliajn samideanojn el Berlin pri la gravaj okazantaĵoj, kaj la 31an, vespere je la 6a, la anoj de la Marda Klubo de Berlin kaj la redakcia stabo de G. E. ekvojaĝis al Dabendorf. Efektive, unuhoran fervojveturon oni povas nomi vojaĝo, ĉu ne? Ni estis sep personoj: onklo Gube, onklo Emmerich, s-ro Tietsch, s-ro Behrendt kun edzino kaj mi kun edzino. La edzinoj ne kunvojaĝis nur pro scivolemo, kiun oni ĝenerale supozas ĉe virinoj, sed precipe pro timo, ke eble okazos al ni akcidento sur nekonata teritorio. Ili volis eviti la vere fatalan eventualecon, ke G. E. por kelka tempo aŭ eĉ por ĉiam estu senigata de siaj „apogiloj“.

Elvagoniĝinte en Dabendorf, malgranda vilaĝo, ni estis akceptataj de meĥanikisto de la firmo Lorenz, kiu kondukis nin al la radio-stacio. Vere, li kondukis kaj ne nur gvidis nin, ĉar la luno ne brilis kaj la malforta lumo de la stelkovrita ĉielo ne sufiĉis por klare ekkonigi la tre malbonan vojon transkampan. Tiel okazis, ke mi faris maltrafan paŝon kaj glitis en fosaĵon, dank' al Dio sen malbonaj sekvoj. Ni devis iri ansermaniere, kaj mia edzino estis malproksime de mi tiel, ke ŝi ne povis malhelpi la akcidenteton. Jen teorio kaj praktiko (vidu supre)! Post migrado de duona horo ni atingis la stacion, kie diplom-inĝeniero Braun de la firmo Lorenz afable akceptis nin. Kun bedaŭro li sciigis al ni, ke en tiu vespero ekzistas multaj atmosferaĵaj perturboj, kiuj verŝajne iom malhelpos la bonan komprenadon. Ankoraŭ alia malhelpo ekzistis: ni estis sep aŭskultantoj, sed je nia dispono estis nur kvar aŭdilaroj. Nu, ĉi tiu malhelpo estis facile forigata. Onklo Gube, kiel plej-aĝulo, ricevis unu aŭdilaron por si sola, dum la ses aliaj personoj pare kunmetis la kapojn kaj tiamaniere estis aŭskultontaj ĉiu nur per unu aŭdilo, kio tute sufiĉis. Nia atento estis streĉita, ĉar ni — escepte de s-ro Behrendt, la fakulo de la konkuranta malnova sistemo kunfadena — ĝis tiam ne aŭdis senfadenan paroltransigon.

La inĝeniero pretigis la aparaton, kaj ni estis kunligitaj kun la universo. Tion ni tuj rimarkis, aŭdante pli-malpli fortajn sibladon, krakadon kaj aliajn nedifineblajn sonojn. La sperta orelo de la inĝeniero komprenis eĉ tiun ĉi haŝon, kaj s-ro Braun klarigis al ni la sonaron: jen la sendado de Königswusterhausen (grandega radio-stacio proksime al Berlin), kiu per sia forta energio sufokas preskaŭ ĉiujn aliajn sendaĵojn, jen la signalo de Eiffel-turo apud Paris, jen serĉado de tie, jen sendado de tie ktp. Konstante li regulis la aparaton por havigi al ni ion kompreneblan. Subite ni aŭdis muzikon. Estis violonĉel-koncerto kun akompano de fortepiano, dissendata de Vox-Haus, Berlin (speciala entrepreno, kiu ĉiuvespere aranĝas tutan programon), al ĝiaj aligintoj. La violonĉelo sonis bele kaj tre klare; ĉi tiu instrumento bonege taŭgas por radio-transigo. Malbone taŭgas por tio la forte-

piano, de kiu oni aŭdas precipe nur la batojn de la klavoj kaj ne la tonvibradon. Poste sekvis akordionkoncerto de alia Berlin-a radio-distrejo. Ankaŭ la akordiono apartenas al la instrumentoj, bone taŭgaj por tiu celo.

Intertempe proksimiĝis la horo de la parolado de s-ro Pitlik. Precize je la 7.50 h. la inĝeniero komencis serĉi la interrilaton kun Praha, akordigante la aparaton je la anoncita ondlongeco de Praha (1150 m). Unue ni ne aŭdis ion alian krom la jam diritaj malagrablaj sonoj. Minuto post minuto pasis sen tio, ke niaj atendoj realiĝis. Fine, post ses minutoj, ekaŭdiĝis la voĉo de s-ro Pitlik. Eĉ se mi ne estus sciinta, ke li parolos, mi estus ekkoninta lin laŭ lia iom rauka, ne plensona voĉo. Li salutis la aŭskultantojn kaj faris mallongan propagandan paroladon pri Ĉeĥoslovakio. Li priskribis la belecojn de sia hejmlando, la vidindaĵojn, precipe la grotojn en la Moravia Karsto, kiujn la partoprenintoj de la XIIIa Kongreso en Praha jam vizitis, kaj finis, invitante al vizito al Ĉeĥoslovakio. Mi jam diris, ke la voĉo de s-ro Pitlik ne estas plensona; tamen lia parolado ĝenerale estis bone komprenebla. Nur malmultajn vortojn mi ne komprenis, kiam por momentoj intervenis atmosferaj aŭ radiaj perturboj. Nur iom pli laŭta la parolado povus esti estinta. Sed ĉi tio verŝajne ne estis ebla, ĉar, laŭ la klarigo de nia inĝeniero, la sendaparato en Praha ne estis sufiĉe forta. Ne konsiderante ĉi tiun malgrandan neperfektaĵon, oni povas diri, ke la parolado de s-ro Pitlik bone sukcesis. Espereble ankaŭ en aliaj lokoj la sukceso ne estis malpli granda.

Por agrable pasigi al ni la tempon ĝis la dua parolado, s-ro Braun ekinterlitis kun Vox-Haus, kiu prezentis alian violonĉel-koncerton: Träumerei (Revado) de Schumann, ĉi tiun fojon kun akompano de harmoniumo. Ĝi estis la plej bela koncertaĵo, kiun ni aŭdis, kaj la harmoniumo sonis multe pli bone ol antaŭe la fortepiano.

Je la oka kaj duono! La aparato estas akordigata por la prezentado el Anglujo je la anoncita ondlongeco de 385 m. Nia inĝeniero streĉe serĉaŭskultas kaj konstante ĝustigas la aparaton por ne maltrafi la ankaŭ anoncitan voksignalon 6 B. M. Ankaŭ ni aliaj ne malpli forte streĉas nian aŭdsenton. Sed la atenditaĵo ne aperas. Ne estis silento en la etero, tute ne; kontraŭe, ni aŭdis amason da sonoj, el kiuj la plej multaj similis al la vekroj de buĉata porko, al bojado de incitataj hundoj, al anserblekado ktp. — vere ne bela „muziko“ por sentemaj oreloj. Mi ne envas la oficistojn, kiuj ofte dum horoj devas aŭskulti tian koncerton. Tiamaniere pasis kvin minutoj, dek minutoj, sed la angla Esperanto-prezentado ne estis kaptebla. Ĉu ankaŭ ĝi ne sukcesis pro simi'a kaŭzo kiel la antaŭe farita eksperimento? Senlace nia inĝeniero daŭrigas sian serĉadon. Subite ni denove aŭdas muzikon: „La Operejo de Newcastle“, klarigas s-ro Braun. Efektive, oni devas miri pri la lerteco, kun kiu la radio-oficistoj scias difini la diversajn aŭdaĵojn. Kelkajn minutojn ni havis la plezuron, aŭskulti anglan operon, poste la serĉado al la Esperanto-prezentado denove komenciĝis. Ĝi restis neaŭdebla. Nur por kelkaj momentoj ni aŭdis anglolingvan paroladon, ne sciante, ĉu ĝi temas pri Esperanto,

ĉar neniu el ni komprenis ĝin, kvankam ĝi estis sufiĉe laŭta. Kia diferenco inter la Esperantaj vortoj de s-ro Pitlik kaj tiuj anglaj vortoj! Ĉi tiu diferenco evidentigis al ni la plej bonan taŭgecon de Esperanto por radio-transigo, fakto, kun kiu la angla lingvo certe ne povas konkuri. Estus interese ekscii, ĉu tiu anglolingva parolado estis programero de la anoncita prezentado. Fine, post kiam ni denove estis aŭskultintaj parton de la opero el Newcastle, nia enetera (!) cicerono rezignis la serĉadon. Se la prezentado efektive okazis, la malsukceso eble rezultis el tio, ke la ondlongeco de 385 m tro malmulte diferencis de tiu de la opero en Newcastle aŭ de tiu de Vox-Haus en Berlin (400 m), ke ĉi tiuj stacioj estis pli fortaj ol tiu en Bournemouth kaj pro tio sufokis la ondojn el Bournemouth. Ni multe bedaŭris la denovan malsukceson de angla radio-eksperimento per kaj por Esperanto. Mi estas scivolema, ĉu la prezentado okazis kaj ĉu ankaŭ en aliaj aŭskultlokoj ĝi malsukcesis.

Por veni al bona fino, ni ree estis interlilitaj kun Vox-Haus, el kies programo ni aŭskultis la lastajn erojn: koncertaĵon de harmoniumo kaj du bonege transigitajn deklamaĵojn. Ĉi tiuj lastaj estis tiel klare kompreneblaj, ke oni eĉ aŭdis la spiradon de la deklamanto; neniu kromsono malhelpis la ĝuon.

Kvankam la ĉefa celo de nia vojaĝo al Dabendorf ne estis atingita, ni tamen ne nekontentigitaj foriris el la radio-stacio. Tio, kion ni aŭdis, ne laste la parolado de s-ro Pitlik, estis vere interesa por ni. Ni povis antaŭsentii la grandajn perspektivojn de la radio-telefonado, kiu ja ankoraŭ estas en infanaĝo, sed de tago al tago pliperfektigas. Verŝajne la tempo ne plu estos malproksima, en kiu ĉiu iom bonstata homo havos radio-aparaton en sia loĝejo kaj povos aŭskulti laŭdezire la okazantaĵojn sur la tuta terglobo. Tiam ni ne plu bezonos fari penplenaĵojn vojaĝojn al niaj universalaj kongresoj, tiam ni ne plu bezonos plendi pri malkomfortaj loĝejoj en la kongresurboj, pri malbonaj aranĝoj de la Lo-Ko-Ko-oj kaj pri diversaj aliaj malagrablaj akompanaĵoj de kongresoj; tiam ni sidos agrable en nia hejmo kaj per radio-telefono interrilatos kaj kongresos kun la tutmonda Esperantistaro. Tiam certe ankaŭ nia lingvo estos elkreskinta el sia infaneco kaj estos ĝenerale uzata; ĉar radio-telefonado inter multaj landoj, sen facile lernebla kaj bone komprenebla lingvo, kia estas Esperanto, preskaŭ ne estas imagebla. Jen nia impresado de la vespero en Dabendorf, kiu konigis al ni unu el la plej grandaj misteroj de la naturo.

La afabla inĝeniero, al kiu ni kore dankis pro liaj klopodoj, akompanis nin al la fervoja stacio kaj reveturis kun ni, ĉar li ankaŭ loĝas en Berlin. Alveninte ĉi tie, la anoj de la Marda Klubo ankoraŭ vizitis restoracion, ĉar onklo Gube ne povas ekdormi, ne antaŭe trinkinte glason da biero. Ĉar li estas la plejaĝulo de la klubo, la du aliaj anoj, onklo Emmerich kaj mi, devis obei al lia ordono kaj akompani lin. Nur mia edzino ne konsentis pri tio; sed, helpate de du obstinaj viroj, mi povis malatenti ŝiajn kontraŭordonojn, kaj ankaŭ ŝi devis iri kun ni. Sed, kiel ĉiam, ni estis solidaj kaj baldaŭ iris hejmen. — Bonan nokton, ĝis la venonta ĉhado!

F. Ellersiek

Esperanto-Movado

Raportoj por ĉi tiu fako estu sendataj ĝis la 15a ĉiunonata por la sekvanta numero (neniukaze pli malfrua!). La redakcio speciale preferas raportojn pri kursoj (ankaŭ en lernejoj!), publikaj paroladoj, grupfandiĝoj k. s. Malpli gravaj aferoj, ekz. festoj, ekskursoj k. s. povas esti citataj ĉi tie nur mallonge.

Mallongigoj: LG = Loka grupo de G. E. A., O = oficejo, P = prezidanto, VP = vicprezidanto, S = sekretario, K = kasisto, B = bibliotekisto, G = gvidanto de kurso, Pa = partoprenantoj.

Germanlingvaj Landoj

GERMANUJO

Ansbach. LG. 7. 1. jarkunveno. Elektiĝis: P: prof. Haas, K: s-ro Rottler, SBG: s-ro Wahnschafft. 18 membroj. O: Oberer Markt 231. Pliperfektiga kurso en la grupo; de post Novembro kurso por laboristoj, 25 Pa, G: s-ro Schmidt.

Berlin. U. E. A. 3. 1. eksterordinara kunveno. Raporto de s-ro Blankenheim pri la antaŭlaboroj kaj korespondado kun CO. Decido, ke Berlin estu teritorio de U. E. A. kun plurnombra delegitaro: 10 delegitaj distriktoj: f-ino M. Rabe, s-roj P. Kirschke, W. Gieseler, A. Schütte, f-ino A. Hempel, s-ro W. Wittbrodt, f-ino E. Werniger, s-roj P. Busch, A. Schulze kaj A. Kleinow. Ĉefdelegito: s-ro M. Blankenheim, vic-ĉefdel.: s-ro W. Brüning. Komercia del.: Dro O. Eberler. 9. 1. pritraktis la delegitaro la laborprogramon.

— *E-Gruparo.* 17. 11. 23 jubilea vespero pro la 20a datreveno de l' fondiĝo de la Berlin-a E-grupo. Parolis la fondintoj s-roj Borel, Dro Wetekamp, Schiff; f-ino Nickel „Pri la 20jara historio de E en Berlin“. Propaganda parolado de Dro Wünsch. 18. 12. Zamenhof-vespero. Parolis Dro Hanauer. 15. 1. 24 ĝenerala kunveno. P: Dir. Glück, VP: s-ro Busch, S: f-ino Nickel, VS: s-ro Löwe, K: s-ro Schwarzschild. Monataj kunsidoj ĉiun 3an mardon en kafejo Josty, Potsdamer Platz.

Berlin-Steglitz. LG „Zamenhof“. 28. 12. 23 jarkunveno. P: s-ro M. Blankenheim, VP: s-ro O. Emmert, S: f-ino E. Werniger, K: s-ro P. Fiebig, B: s-ro E. Hahn. Monata kotizo l' ormarko. G. E. senpage. Ĉiuvendrede kunvenejo Stubenrauchplatz 5.

Breslau. LG. P: s-ro Selten, VP: s-ro Freund, K: f-ino Menzel, S: f-ino Wolfson. E-paroladoj: s-ro Freund: „Konferenco en Venezia“, „La Nürnberg-a kongreso“, „Vojaĝo al Litovio“, „Pri Sovjet-Ruslando“, „Italujo kaj Italoj“, s-ro G. Habellok: „Postmorta cindriĝo“, „Pri la kongreso“; s-ro E. Habellok: „Esperantista movado junulara“; s-ro Schnabel: „Elparolado en E“; s-ro Selten: „La blindulkongreso en Nürnberg“; f-ino Wolfson: „Iom pri la lingvo homa ĝenerale“. 15. 12. Zamenhof-festo aranĝita de ĉiuj Breslau-aj grupoj. La grupo partoprenis propagandajn aranĝojn en Schweidnitz, Königszelt kaj Saarau.

Chemnitz. Esperantistaro. 20. 12. kristnask-festo en la hejmo Theaterstr. 45. Interalie deklamo de aktoro Richter-Anschütz el „Natan la Saĝulo“. La sindiko de Ch.-a komerca ĉambro, Dro Heubner, estas favora al E.

Dresden. G. E. A.-Loka Unuiĝo Dresden unuigis la 30an de Januaro grandan parton de siaj anoj en la feste ornamita, malnova „urba magistrata

salono“ por ĝojigi sian *Honoran Membron s-inon Hankel* okaze de ŝia 80a naskiĝtago. Sub la sonoj de la pilgrima horkanto el „Tannhäuser“ de Wagner, ludata de kvarteto de blovinstrumentoj, la jubileulino estis kondukata en la salondon, dum la multaj ĉeestantoj salutis ŝin per solena levigo. Post la horal-ludo „Laŭdu ni Dion, potencan la reĝon de l' tero“ samideano Johannes Karsch gratulis s-inon Hankel per varmaj vortoj al ŝia 80a naskiĝtago kaj donis poste detalan bildon pri la vivo de la jubileulino ĝenerale kaj de ŝia Esperanto-vivo speciale. La paroladanto menciis aparte la plenkoran, sindonan, la ĉiaspecan laboron kaj la fajran entuziasmon de s-ino Hankel por nia afero kaj alvokis la ĉeestantaron, fariĝi simila al ŝi en tiu ĉi glorindaj celoj. La priskribo de la Esperanto-vivo de s-ino Hankel estis ilustrata per kanto „Esperantujo“ (f-ino Hildegard Nickel, Potsdam, kiu nur por tiu ĉi celo venis Dresden-on) kun fortepiano-akompano de s-ro Brüggmann) kaj per deklamoj de poemoj el „Sableroj“ (f-inoj Knappe, Wild, Schindler, s-ino Krestanoff); komuna kantado de la Esperanto-himno sub pompa akompano de la muzikistoj finis la impresan unuan parton de la festo. Poste s-ro Eugst gratulis nome de la Loka Unuiĝo, D-ro Heinrich Arnhold nome de G. E. A., samtempe sciigante, ke tiu ĉi asocio decidis, nomi s-inon Hankel „honora membro“. Parolis post fortepiano-ludo de „Berĉeuse“ (Chopin) de s-ro Brüggmann ankoraŭ reprezentantoj de la Esperanto-instruistaro (s-roj Weitzmann, Scheibler, Sohrmann), f-ino Nickel en komiso de la Berlin-aj grupoj, kaj f-ino Kunze por G. E. kaj la firmo E. & B. La himno de Beethoven „La gloro de Dio en la naturo“ majeste finis la festvesperon, kiu estis riĉa elmontro de la granda honoro kaj amo, kiun la kara okdekjarulino ĝuas ĉe la samideanaro. S-ino Hankel per elokventa parolado dankis por ĉiuj gratuloj kaj bondeziroj kaj promesis, la al ŝi ankoraŭ restantan vivotempon same kiel ĝis nun dediĉi al nia kara afero! *Loka grupo Dresden*

Glashütte (Sa.) Kurso kun 20 Pa.

Großenhain (Sa.) Pere de E-Unuiĝo de Saksa Instruistaro ricevis lernanto de la metia lernejo pakajo kun nutraĵoj el Saalfelden (Aŭstrio). Dankon al la donacinto!

Koblenz. LG. Kotizo tiel fiksita, ke G. E. estas liverata al ĉiuj membroj. Nova kurso. Kunvenoj por progresintoj ĉiumerkrede en restoracio Scheidt, Friedrichstr. 56.

Kötzschau. LG. 16. 12. 23 unua fondiĝofesto kun Zamenhof-festeno.

Kreuznach. LG. 7. 1. ĉefkunveno. La ĝisnuna estraro reelektiĝis. K: f-ino M. Strauß. G. E. devige abonata. Ĉiun 1. kaj 3. lundon de monato ĉiu progresinto devas paroli pri libere elektita temo. Leteraj vesperoj aranĝotaj.

Leipzig. *Zweierverein.* Nova estraro: P: s-ro Bartsch, VP: f-ino Venscki, K: s-ro Decker, S: s-ino E. Schladitz, Leipzig-Reudnitz, Comeniusstr. 16, B: f-ino Schubert. Kunvenoj ĉiujaude en Auguste Schmidt-Haus, Dresdner Str. 7.

Nünchritz. LG. 18. 1. ĉefkunveno. Nova kurso depost Novembro, 10 Pa, G: s-ro Fr. Wiesemann.

Plauen (Vogtl.). LG. 10. 1. Jarĉefkunveno. Raportoj montris, ke dum 1923 la Esperanto-vivo bone prosperis. S-ro Wünsche kaj f-inoj Jacob kaj Sachs ricevis libro-donacojn pro ĉiama ĉeesto en la grupaj kunvenoj. Por 1924 la estraro estos la ĝisnuna. En la grupan konsilantaron oni elektis s-ron reg. kons. Beier kaj f-inon Wünsche. En 1924 la grupaj kunvenoj okazos kiel ĝis nun en la „Hejmo“, Gottschaldstr. 25¹¹. Dum ili estos ĉiam prezentataj nuresperantaj paroladoj, poemoj ktp. Oni decidis konservi la principon, paroli ĉion dum la kunvenoj Esperante, tute egale ĉu „varmegaj“ disputoj aŭ serena habilado! La grupan kotizon oni fiksas je 75 Pf. por monato; ĉiu membro ricevos nian asocian gazeton „Germana Esperantisto“ senkoste senpere el la eldonejo.

Potsdam. La ĉi-loka naŭklasa mezgrada knabinlernejo (Charlottenschule) baldaŭ havos 10-an superan klason, en kiu estos instruataj komercado kaj mastrumado. Por la programo rektoro Günther volas alpreni kiel fremdlingvajn fakojn anglolingvan korespondadon kaj Esperanton.

Radebeul. LG. 16. 1. jarkunveno, nova P: s-ro E. Rösch. 43 membroj. Najbaraj grupoj en Coswig, Weinböhla kaj Gohlis regule vizititaj. 30. 1. perfektiga kurso, G: s-ro E. Rösch.

Schwiebus. LG. 18. 1. ĝenerala kunveno. P: s-ro Dluhosch, SB: Puthz, K: s-ro Menzel. 25. 1. kurso por komencantoj, 10 Pa, G: instruisto Dluhosch. Donaciĝis brodita de du membroj standardo.

Waldshut (Baden). LG. Nova P: s-ro H. Lauer, Gurtweiler Str. 27.

Weinböhla. La 5-an de Jan. okazis festo por la ĉi-tieaj E- infanoj. La infanoj kantis, deklamis kaj ludis teatraĵon en E. Lokaj kaj eksterlandaj amikoj de nia movado helpis per donacoj al la plena sukceso de la kristfestoj por niaj geuloj. La vizito estis tre multnombra, la entuziasmo por E granda.

Worms. Instruisto Fr. Pfaff instruas E-on en klaso por talentuloj kiel nedevigan fakon de post Pasko 1923 kaj en klaso de komerca perfektiglernejo (11 knabinoj).

ĈEĤOSLOVAKUJO

Ligo de Germanaj E-Societoj en Ĉeĥoslovakujo

Propagandado en *Janessen, Altrohlau, Drahowitz* (kurso), *Aich* (kurso, 32 Pa), *Horn, Meierhöfen* (enkondukata en la lernejon kiel nedeviga fako, po 2 lecionoj dum semajno). Ĉiuj lokoj apud Karlsbad.

Distrikto M.-Schönberg. En *Landskron* 12. 12. parolado en la instruista rondo, dum kristnaska komercaj-ekspozicio E-stando. En M.-Schönberg 7. 12. publika parolado.

Distrikto Nord-Moravio-Silezio. 16. 12. tria ĉefkunveno kaj Zamenhof-a rememorfesto en Jägerndorf.

Alilingvaj Landoj

Francujo. Novaj grupoj en *Perpignan* (por organizi koncertojn kaj teatrajn prezentadojn kaj propagandi en literaturaj kaj artaj medioj) kaj

Rouen. Kursoj komenciĝis en *Béziers, L'Estaque* (apud Marseille), *Marseille* kaj *Orléans*.

Japanujo. Novaj grupoj en *Tokio* (medicinaj profesoroj kaj studentoj), *Jonezaŭa* (teknika kolegio) kaj *Macue*; kursoj en *Tokio, Jonezaŭa, Jamagata*. La submara ŝipo n-o 43 propagandis en ĉiuj lokoj vizititaj de ĝi.

Meksiklando. Rilate al cirkuleroj senditaj al komercaj ĉambroj pri la Venezia konferenco respondis multaj el ili tre favore kaj petis la ministron de publika instruado pri starigo de Esperanta kurso almenaŭ en komercaj lernejoj. Kurso por blinduloj en Meksikurbo.

Sudslavio. Kursoj en *Zagreb (Agram), Supak, Daruver, Sisak, Caprag* kaj *Janjina*. La IIa Sudslava E-Kongreso okazos en *Split*.

Usono. La E-vivo en New York estas tre vigla. La gazeto „New Jersey Post“ daŭre raportas pri ĝi. Infanoj de diversaj nacioj lernas en kelkaj lernejoj E-on. Diversaj unuiĝoj: Hudson County-E-Societo, New York-E-Societo, Harmonio, Esperantista Laborista Grupo. *A. Naumann*

Esperanto en la praktiko

Printempa Foiro Leipzig 1924

Ĝi okazos de la 2a ĝis 8a de marto, ampleksante Ĝeneralan Specimenan Foirojn kaj Foirojn por Tekniko kaj Konstrufako — kaj en ili ĉiujn branĉojn de ĉia industrio. La Leipzig-a Foiro estas la plej granda foiro de l' mondo, dum kiu ekspozas 13000 firmaoj sur areo de 275000 m². — Nombro de la aĉetantoj regule pli ol 150000. — Ĝi estas vere „internacia“ foiro, ĉar inter ekspozantoj kaj aĉetantoj estas reprezentataj preskaŭ ĉiuj landoj, kelkaj en apartaj foirdomoj (Svisa, Aŭstra, Ĉeĥoslovaka) aŭ en apartaj kolektivekspozecoj (Hungara, Sovjetruslanda). Pro la plej taŭgaj kaj vere modelaj aranĝoj la foiro prezentas por ĉiuj vizitantoj avantaĝojn, financajn, ekonomiajn, komercajn, instruajn, moralajn, ebligante interrilatojn kun komercistoj el ĉiuj landoj, informante pri la industria stato de Germanujo kaj de la tuta mondo.

Informojn petu de la Meßamt für die Mustermessen in Leipzig aŭ de la „Esperanto-Fako“ de la Leipzig-a Foiro „Leipzig, Markt 4“. — Dumfoira Renkontejo por Esperantistoj: Johannisplatz 3, I.

Esperanto-Fako de la Leipzig-a Foiro
Meßamt für die Mustermessen in Leipzig



Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj.
U.E.A. bezonas dek mil membrojn.
Aliĝu al U.E.A.!

Esperanto-Kongresoj

XIIa Germana Esperanto-Kongreso en Plauen (Vogtlando)

Pentekoston 1924 (7.—10. de Junio)

SESA KOMUNIKO

Ĉu vi jam aliĝis? Oni nepre vizitu la XIIan germanan kongreson, kiu donos al ni gravajn taskojn, sed kiu ankaŭ unuigos la Esperantistaron en urbo kun plej bela naturo en tute apuda proksimeco! Vi uzu la okazon, konatiĝi kun la tielnomata „Vogtlanda Svisujo“ kun ĝiaj arbaregoj, valoj, montoj kaj pontegoj. Kia sezono taŭgas pli bone ol Pentekosto por kongresvojaĝo?

Aliĝo povas okazi per aliĝilformularo aŭ letere al la adreso de la subskribinto. Ankaŭ tiujn, kiuj ne povos viziti la kongreson aŭ kiuj ne ankoraŭ povas certe decidiĝi, ni petas, ke ili aliĝu malgraŭ tio! Ili tiamaniere ankaŭ helpas la Esperantomovadon!

Kotizo estas M 3.—, por edzinoj kaj infanoj po M 1.50. Eksterlandanoj pagas la saman kotizon. Estas rekomendinde, ke oni aliĝu *tuj*, ĉar de post la 31a de Marto la kotizo plialtiĝos je M 1.—; do ĝi estos poste M 4.—. Krome vi per baldaŭa aliĝo plifaciligas la kongresajn antaŭlaborojn!

Monsendojn oni direktu al la subskribinto aŭ al Vogtländische Bank, Plauen, kiu havas poŝtĉekan konton Leipzig n-ro 898. Sed oni samtempe informu la bankon, ke la mono estas uzota por la Esperanto-Kongreso.

Kvitancarto: Ĉar ni havas plurajn aliĝoj-kolektejojn, ni petas, ke oni sciigu nin, se oni dum 3 semajnoj post la pago ne ricevis kvitancarton. *Nur ĝi rajtigas ricevi la kongresaĵojn en la akceptejoj!*

Loĝejoj: Parto de la aliĝintoj aliĝis jam antaŭ 1½ jaroj; plura parto volas informi nin ankoraŭ koncerne la loĝejon. Pro la tiurilata neklareco ni decidis, prizorgi loĝejon *nur* por tiuj, kiuj *de nun* sciigos nin, por kiuj punktoj ili certe deziras litojn, kaj ĉu ili deziras loĝejon en hotelo aŭ privatan ĉe familio. Ni penos atingi plej eble grandan malmultekostecon!

Fakkunsidoj: La tempojn por ties okazigo oni vidu el la programo ĉi-sekve publikigata. Denove ni petas, ke oni sciigu al ni dezirotajn fakkunsidojn plej eble baldaŭ.

Aliĝu ĉiuj kaj venu!

Hermann Scheider

Plauen (Vogtl.), Morgenbergstr. 47

Programo de la Plauen-a Kongreso

7. 6. vespere je la 8a: Interkonatiĝa vespero
8. 6. matene je ½9a: Kunsido de G. E. A. Konsilantaro. Samtempe — sed nur se speciale dezirita — fakkunsidoj preparaj; je ½11a: Solena kongresmalfermo; je 1a: Komuna tagmanĝo (ne festbankedo); posttagmeze je 3a: Ia Ĝenerala

Laborkunsido de G. E. A.; vespere je 8a: „Vespero en Esperantujo“ (seriozaj kaj serenaj prezentaĵoj de ge-eminentuloj el Esperantujo)

9. 6. matene je 9a: Fakkunsidoj; je 12a—½2a: Tagmanĝo; posttagmeze je 2a: Ila Ĝenerala Laborkunsido de G. E. A., poste oficiala ferma kunsido; vespere je 8a: Gaja vespero kun balo
10. 6. dumtage: Ekskursoj en la proksiman kaj pli malproksiman ĉirkaŭaĵon; gvidoj tra la urbo; vizito al vidindaĵoj.

XVI. Universala Kongreso de Esperanto en Wien — Vieno

UNUA BULTENO

La Esperantista gazetaro kaj ankaŭ kelkaj naci-lingvaj jurnalaj raportis pri la decido de la Centra Komitato en Paris en Septembro 1923, okazigi la XVIan Universalan Kongreson de Esperanto 1924 en Wien-Vieno (Aŭstrujo).

La Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.), interkonsente kun la lokaj organizoj Esperantistaj en Wien-Vieno aprobis en Oktobro kaj Novembro 1923 la al ĝi proponitan nomaron de la Lokaj Kongresaj Komitatoj (L. K. K.).

Nun la L. K. K. dissendas la oficialan inviton al la XVIa, kiu — 12 paĝa — enhavas krom ĝenerala saluto al la tutmonda Esperantistaro kelkajn sciigojn pri la kongresurbo Wien kun vidindaĵoj en tiu urbo kaj la unuan raporton pri ĝis nun anoncindaĵoj preparaj laboroj por la Kongreso.

Aliĝilo almetita kaj resendota de la ricevinto al la L. K. K. prezentas kotiz-tabelon preskaŭ egalan kun tiu por la XVa en Nürnberg.

Specimenoj de la oficialaj kongres-salutmarkoj estas aldonitaj, ankaŭ speciala respondilo.

Kiu ankoraŭ ne ricevis inviton, tuj *postulu* ĝin sub la simpla adreso:

Esperanto-Kongreso, Wien, Aŭstrujo.

La Loka Kongresa Komitato
Schade, ĉefsekretario

Noto de la Red.: Al la Unua Bulteno la s-ro ĉefsekretario aldonis la informon, ke el la malgranda Aŭstrujo aliĝis al la XVIa ĝis mezo de Januaro 430 gesamideanoj. Bedaŭrinde ni ricevis nur unu ekzempleron de la supre menciita oficiala invito! Ni tre bedaŭras ĉi tiun fakton, ĉar ĝis nun ni havis la kutimon, per tiaj invitiloj propagandi kaj varbi por la Kongreso. La tempo urĝas! Niaj amikoj en Wien ne estu tro ŝparemaj!

Kara samideanaro tutmonda!

La Loka Kongresa Komitato de la XVIa sendas al vi la unuajn salutojn.

El Wien — aŭ Vieno, laŭ ĝia Esperanta nomo — venas la salutoj irantaj tra la tuta mondo ĉiulanden, direktataj al ĉiuj popoloj, kiujn jam atingis la Nova Sento.

La Loka Kongresa Komitato de la XVIa deziras, ke jam ĝiaj unuaj salutoj renkontu la korojn de la amikoj, plenigante ilin per certeco, ke la salutoj venas el la koroj de la tuta, jam multnombra, samideanaro en Wien.

Jen, la unua kaj plej sincera deziro de la Aŭstruja Esperantistaro: Amikaj rilatoj al ĉiuj partoj de la terĝlobo, frata kompreno reciproka kun ĉiuj popoloj!

Tia kulturcentro, kia estas Wien, povas ekzisti nur per tiaj principoj. Starante sur tia fundamento vere Esperantisma, la kongresurbo de la XVIa invitas la tutmondan Esperantistaron, veni Wien-on, kie jam komenciĝis la preparaj laboroj por deca aranĝo, kie oni deziras akcepti la ŝatindajn gastojn ne nur per korega bonveno, sed ankaŭ zorge kreante certecon pri tio, ke la XVIa en Wien restados valora travivaĵo kaj agrabla rememoraĵo.

Wien, la mezeŭropa kongresejo ĝenerala, pro tio jam sufiĉe estas konata en ĉiu lando civilizita laŭnome, sed ne ĉiam kaj ĉie en la senco konforma al la vera situacio. Tial niaj troveblaj inter ĉiuj popoloj amikoj, kiuj per propra sperto jam konvinkiĝis pri la unika kvalito de nia urbo por kongresoj, estas petataj, prediki tiun fakton al ĉiu, kiu ankoraŭ nenion scias pri la granda trezorejo Wien enhavanta nombregon da valoregaĵoj artaj, kulturaj, historiaj kaj pejzaĝaj. Kaj niaj amikoj rakontu ankaŭ pri la loĝantaro de ĉi tiu belega kongresurbo, ne superebla de iu ajn alia en gastamo al multgenta fremdularo regule trovebla en Wien.

Do, bonvole akceptu nian saluton, nian koran inviton, venu kaj donu al ni la eblecon, premi vian manon, ĉu kiel amiko pro idealaj celoj komunaj, ĉu kiel kunulo pro realaj motivoj. — *Anoncu vin tuj kiel aliĝanto al la*

XVIa Universala Kongreso de Esperanto 1924 en Wien-Vieno

Samideane salutas la

Loka Kongresa Komitato
Schröder Schade
1a prezid. ĉefsekr.

Wien, Januaro 1924

Tre estimindaj amikoj!

Jam nun vi ĉiuj certe estas scivolemaj pri la stato de la preparaj laboroj por nia XVIa, kaj la Loka Kongresa Komitato tre bone komprenas tion. Tial ni sendas al vi kun plezuro unuan raporton.

La dissendado iomete malfruiĝis, ĉar ni perdis du monatojn per la prokrasto de elekto de la urbo Vieno, kaŭzita de la intertraktoj de K.K.K. kun niaj samideanoj en Bulgarujo, amike finitaj.

Aliĝo. Ĉiu, kiu pagis la kongresan kotizon, estos registrata kiel kongresano kaj rajtas ricevi kongreskarton kiel legitimacion, krom ĝi insignon kaj kongreslibron, laŭbezzone ankaŭ raportojn necesajn por ĉiuj kongresanoj.

Kotizo. La porkongresa laboro kaŭzas sufiĉe grandajn elspezojn, tial la Loka Kongresa Komitato devas peti, ke la samideanoj *tre baldaŭ aliĝu kaj tuj pagu* la kotizon laŭ speciala tabelo sur la Aliĝilo. — Ju pli rapide vi aliĝos, des pli agrable estos por vi mem kaj por la L.K.K. (Por Germanoj la kotizo estas 2.5 svizaj Fr. aŭ 35000 aŭstr. kronoj; blinduloj aliĝas senpage.) — Ĉiu sendu la kotizon en la mono de sia lando. Mendoj aŭ aliĝoj ne akompanataj de pago ne povos esti registrataj. — Favorkotizoj por familianoj ne ekzistas. — Repago de kotizoj ne okazos. — Post la 31a de Marto la kotizoj estos plialtigataj je 30%. — Aliĝo en Junio aŭ Julio kaŭzos plialtigon de la kotizoj entute je almenaŭ 50%.

Banko. Al eksterlandanoj ni rekomendas, sendi la kotizon simple en registrita letero, aldonante la necesan sumon per monbiletoj aŭ poŝtmarkoj ilia-landaj aŭ per bankĉeko; alie ni devus peti pagon per banko en ilia lando al nia kongres-banko en Wien, adreso: Wiener Bankverein, Wien, kun la rimarko: Konto Esperanto-Kongreso Wien.

Vojaĝo. La Loka Kongresa Komitato jam nun interrilatas kun la Aŭstrujaj kaj per ili kun la eksterlandaj fervojaj oficejoj, por ricevikontentigan rabaton, kiu malaltigos la vojaĝelspezojn de niaj amikoj.

Pasporto. De la Aŭstrujaj registaro — ministro por eksterlandaj aferoj — ankaŭ tiurilate jam nun estas postulita la kutima faciligo koncerne la kongresvojaĝon. Ni treege deziras, ke la konsuloj sufiĉe frue estu informitaj pri la konsenta decido de nia registaro.

Loĝigo. Por kongresanoj ĉiam la loĝigo estas tre grava afero, kaj en tiu ĉi direkto la Loka Kongresa Komitato havas vere respondecan taskon. Tial ekzistas en Wien jam nun speciala komitato el fakuloj kun la necesaj spertoj, por prizorgi grandan nombron da ĉambroj taŭgaj por niaj ŝatindaj gastoj. Multaj el ili trovos lokon en diversrangaj hoteloj, tute laŭdezure, sed pli multaj povos ricevi litojn privatajn, pagante nur malaltan prezon. — Pri

Manĝado, same kiel pri la loĝigo, la Loka Kongresa Komitato sendos ankoraŭ precizajn informojn, ĉar precipe ĉi tiuj demandoj devigas al zorga preparo. Sed jam nun ni povas garantii al nia kara samideanaro la tute kontentigan kapablon de nia bonege konata kongresurbo Wien en tiuj rilatoj. Ĉu vi deziras vivi ĉi tie laŭ unuaranga maniero kiel riĉegulo, ĉu laŭ duaranga aŭ eble nur kiel ŝparema vojaĝanto kontentigebla ankaŭ per tre simpla kvalito: vi nur bezonos elekti, kaj vi nepre trovos, kion vi serĉis.

Informoj: La konstanta sekretario de la XVIa jam funkcias. Bezonante iun ajn informon, vi skribu sub la sola kaj simpla adreso: *Esperanto-Kongreso, Wien.* Specialaj oficejoj kompreneble funkcios dum la kongres-semajno: por vojaĝaferoj, monaferoj, demandoj pri loĝigo k. c. en la

Kongresejo. La plej bela, la plej komforta, la plej taŭga por nia celo palaco en Wien jam estas garantiita por la grandaj solenaj kunvenoj. Domego kun belega akceptejo kaj konvena informejo, kun halo por promenado kaj interbabilado, kun ekspoziciejo, kun tri diversampleksaj salonegoj, kun garderoĉejoj, kunsido-ĉambroj, restoracio k. c. estos al via dispono. La Kongresejo, meze en la centra parto de la granda urbo, meze inter la ĉefaj vidindaĵoj, meze inter belegaj parkoj kaj grandiozaj muzeoj, proksima al gravaj amuzejoj, certe plaĉos al vi, karaj amikoj, kaj certe vi bedaŭros, kiam vi devos forlasi ĝin, por hejmenvojaĝi.

Kongres-Programo. Pardonu, tre estimataj samideanoj! Eble vi jam hodiaŭ volas scii laŭhore la okazontaĵojn dum nia XVIa? Guste pri tiu ĉi punkto ni ne raportas al vi ĉi tie hodiaŭ detale, sed tre baldaŭ, post kiam ni eksciis, ke vi estos nia kara, tre ŝatinda kaj tre bonvenonta gasto! —

Sed pri tio ni jam nun devas informi vin, ke la XVIa komenciĝos la 6an de Aŭgusto, vespere, kaj finiĝos la 13an aŭ 14an. Dum la unuaj 3 tagoj la ĉefa tasko estos la laboro por Esperanto, la lastaj 3 tagoj estos ĉefe amuzigaj, kaj en la mezo troviĝos

granda, publika, serioza manifestacio por Esperanto. — Speciala celo de la L. K. K. estos, interkonsente kun la K. K. K., bone gardi pri vere internacia kaj neŭtrala karaktero de la deksesna Kongreso.

Fakaj Konferencoj ankaŭ estos aranĝataj, sed nur, kiam ekzistas personoj gvidantaj por ili, kiuj povas garantiĝi vere seriozan laboron de tiaj konferencoj, intensan preparon, preskaŭ la sukceson mem de tia konferenco. Jam nun estas certaj multaj fakaj konferencoj, precipe de: Blinduloj, Fervojistoj, Framasonoj, Instruistoj, Junuloj, Katolikoj, Komercistoj, Kuracistoj, Policistoj, Poŝtistoj, Teknikistoj, Teozofoj, U. E. A.-Delegitoj k. c. — Organizo, kiuj havas socialan, politikan, pacifistan aŭ alian, ne tute neŭtralan programon, devas entrepreni konferencojn aŭ kongresojn memstare kaj tute aparte, ne kunligante ilin kun la XVIa. — Oni postulu de la L. K. K. la „Instrukciaron“ por aranĝantoj de fakkonferencoj.

Helpo. Kara XVI-ano, vi mem ankaŭ povas kunhelpi, por certigi iurilate la dezirindan sukceson de nia Wien-a Kongreso. — 1. *Vi tuj aliĝu!* — 2. *Vi atentigu amikojn* en diversaj landoj, kun kiuj vi korespondas, ke ili ĉiuj nepre veturu al la XVIa Wien-on, ĉu unuope, ĉu karavane, se tiu aranĝo estos ebla. — 3. *Vi uzu la propagandamarkojn* de la XVIa, por ke ne estu unu homo en la tuta vasta Esperantujo, kiu ne scias pri nia XVIa. — 4. *Vi subskribciu* por la *Garantia Kapitalo* de la XVIa iun sumon sendanĝere, ĉar laŭ la ĝisnunaj spertoj tiurilataj via garantia mono tute ne, aŭ almenaŭ ne tute, t. e. nur proporcie, estas postulota. — 5. *Vi simple donacu* iun sumon al la kaso de la XVIa. — 6. *Vi raportu al vialandaj ĵurnaloj* pri la aranĝo de la XVIa Universala Kongreso de Esperanto en Wien dum Aŭgusto 1924 a. — Jen, elektu, samideano; vi povas helpi multmaniere! Do:

Aliĝu tuj vi mem, varbu amikojn kaj subtenu iomete la grandan laboron de la L. K. K.!

Franz J. Schade

Oficialaj Institucioj kaj Internaciaj Organizajoj

Akademio kaj Lingva Komitato

Post la diversaj elektoj de 1923, la Akademio konsistas nun el:

Prof. Th. Cart, *Prezidanto*, s-ro J. M. Warden kaj Dro J. Dietterle, *Vic-prezidantoj*, Prof. E. Grosjean-Maupin, Dro W. Lippmann, Dro E. Privat, *Direktoroj de la fakaj Sekcioj*, s-ro W. Bailey, Prof. P. Christaller, Dro P. Corret, Prof. A. Dombrowski (s-ro E. Evstiféjeff), s-ro V. Inglada, s-ro G. Isbrücker, s-ro E. Kühnl, s-ro P. de Lengyel, Prof. B. Migliorini, s-ro E. A. Millidge, s-ro P. Nylén, *membroj*.

Akademijaj Korespondantoj: S-ro Rollet de l'Isle (Scienca kaj Teknika Vortaro), s-ro W. Setälä (Finna lingvo), s-ro M. Solá (Kataluna), s-ro A. Tellini (Ladina), Dro Leono Zamenhof (Pola).

Sekcio Komuna Vortaro: Prof. Grosjean-Maupin, *Direktoro*, s-roj Bailey, Migliorini, Millidge, Nylén; Bünemann, Solá, *membroj*.

Sekcio Gramatiko: Dro Lippmann, *Direktoro*, s-roj Christaller, Corret, de Lengyel; Collinson, Stojan, *membroj*.

Sekcio Konkursoj kaj Premioj: Dro Privat, *Direktoro*, s-roj Isbrücker, Kühnl; s-ino Hankel, s-roj de Ménil, Stroele, *membroj*.

Mankas ankoraŭ, por ke niaj Lingvaj Institucioj estu *plene* reorganizitaj, granda parto de la ruslingva reprezentantaro. Bedaŭrinde sen respondo ĝis nun restis la leteroj de l' Prezidanto, ĉu ĉar ilin ne ricevis la korespondantoj en Rusujo, ĉu ĉar iliaj respondoj ne alvenis Francujon. Tamen oni rajtas esperi, ke la petitajn sciigojn la Akademio ricevos fine kaj ke antaŭ la Viena Kongreso ĉio estos en plena ordo.

Sekcio Komuna Vortaro. — La Esperantistoj, jam sufiĉe multnombraj, kiuj sendas al la faka Direktoro manuskriptojn por tralegado rilate la vortaron, estas petataj sendi kun la manuskripto 10 francajn frankojn (aŭ saman valoron). La Direktoro sciigos poste la aŭtoron pri la de li definitive pagota sumo, kiu dependas de la amplekso kaj de la pli-malpli bona stila valoro de l' manuskripto.

En Presado. — Prof. Grosjean-Maupin: *Oficiala Radikaro*, kun tradukoj en franca, angla kaj germana lingvoj kaj Esperanta difino de l' vortoj, kies signifo povas esti duba.

La sama kun tradukoj en aliaj lingvoj aperos poste.

Malprave oni riproĉas la Lingvajn Instituciojn, ke tro modestaj estas iliaj laboroj (*3a Aldono, Vortaro de la oficialaj radikoj, Korekto de la eraraj tradukoj en U. V.*). Oni ne rajtas forgesi, ke post longa milito la unua tasko estis ilia reorganizado kaj aliflanke ke, en la postmilita periodo, kiam ĉiu nacio emas vivi „ĉe si“, kiam la internaciaj rilatoj preskaŭ ne plu ekzistas, kiam en multaj randoj malpli sentebla fariĝis la bezono pri internacia lingvo, kiam la financa demando ĉion malfaciligas, modesteco estas forto: modesta fajro, se tiuj, kiuj zorgas pri ĝi, estas *obstine persistemaj*, daŭras, dum paja fajrego momente brilas, sed baldaŭ estingiĝas de si mem aŭ sub la akvo de la akurintaj pumpistoj! — Ni estu obstine persistemaj, ni laboru senbrue kaj, kiam pli helaj tagoj venos, kiujn ni ankaŭ sur diversaj kampoj klopodos por kiel eble baldaŭigi... tiam, se ni Esperantistoj, dank' al nia severa lingva disciplino, — de ĉiuj pri ĉiuj punktoj fine akceptita, — sciis konservi al nia lingvo ĝian internacian *unuecon*, ĝian vortaran simplecon, ĝian komunan facilecon, nenia forto, nenia kontraŭbato malhelpos la triumfon de nia Zamenhofs Esperanto!

20. Decembro 1923.

Th. Cart

Prezidanto de la L. K. kaj de ĝia Akademio
Paris, Rue de Clichy 51.

Ligoj * Verbände

Esperanto-Vereinigung deutscher Lehrer (Asocio de germanaj instruistoj Esperantistaj)

La jarkotizo por Esp.-Vgg. deutscher Lehrer (asocio de germanaj instruistoj Esperantistaj) nun post la stabiligo de la germana marko estas 15 ormarkoj kaj ree estu pagota por la tuta jaro, ne plu kvaronjare. La kotizon oni sendu al nia kasisto, kolego Franz Thiel, Dresden-A. 29, Weidentalstr. 20. (Postscheckkonto Dresden 733, Stadtgirokasse Dresden 4651.) A. Sohrmann, Weinböhla prez.

Esperanto-Vereinigung Sächs. Lehrer

Vorläufige Tagesordnung für die Hauptversammlung am Montag, dem 14. April, 9 Uhr vorm., Brauhausgarten in Bautzen (anlässlich der Vertreter-Versammlung):

1. Jahres- und Kassenberichte; 2. Kritiko pri la „Statistiko“; 3. Wahlen; 4. Neufestsetzung der Satzungen; 5. Übersetzung von Klemms Kulturkunst (1. und 2. Teil); 6. Raporto de kolego Pfützte pri: Internacia lerneja servo; 7. Kongresse in Plauen, Wien, Dresden; 8. Verschiedenes.

Punkt 2 und 6 werden in Esperanto verhandelt. Nachmittag: Gemeinsamer Bummel in Bautzens Umgebung. Abends findet voraussichtlich ein öffentlicher Werbevortrag statt. Zur Hauptversammlung haben nur Mitglieder Zutritt. (Mitgliedskarten mitbringen!)

Preis Ausschreiben der Sächs. Schulzeitung Nr. 2, S. 30 beachten: 50000 \$, *wer die beste Möglichkeit ausfindig macht, den Weltfrieden wiederherzustellen.* Kollegen, bewirbt Euch!

Dazu ein herzliches Glückauf!

Wurgwitz b. Dresden, im Januar 1924.

Reinhold Scheibler,
1. Vors. der Abt.

Diversaj Komunikoj

DE LA ELDONEJO

Kovrilo de G. E. La ricevintoj de la januara numero certe miris pri tio, ke, malgraŭ nia mala informo, tiu numero tamen estas vestita per la antaŭjara kovrilo. Tio okazis sekve de eraro en la presejo, kaj nek la redakcio nek la eldonejo estas kulpa pri ĝi. De nun la gazeto ĝisplue elvenos en la formo kiel ĉi tiu numero.

DE LA REDAKTEJO

Indekso pri la enhavo de l' G. E. kaj E. P. 1923 ne aperis, ĉar ni ricevis tro malmultajn mendojn.

— Bibliografio —

La libroj ktp. signitaj per steleto estas haveblaj ĉe Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H., Berlin SW 61. La montritaj prezoj estas ne levigaj. — Gm. = Goldmark = ormarko (germana). Por eksterlando la ormarkaj prezoj estas transkalkulotaj laŭ la tabelo sur la titolpaĝo de l' kovrilo.

* **Wüster, Eugen**: Maŝinfaka Esperanto-Vortaro Prielementa. (La maŝinelementoj; maŝinoj; plej gravaj esprimoj el la konstrukiado kaj teknologio.) Deutsche Ausgabe (Esperanto-Deutsch und Deutsch-Esperanto mit Zahlenverweisen). Leipzig 1923: Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako. (89 p., 12 × 17 cm.) Gz. 2.50 M. [335]

Das reichhaltige, sorgfältig bearbeitete Fachwörterbuch, gleich wertvoll nach der technischen wie nach der sprachlichen Seite, stellt einen bedeutenden Schritt auf dem Wege zur Einführung des Esperanto in die zwischenvölkische Technik dar; es vereinigt auf kleinstem Raum ein Esperanto-Deutsches und ein Deutsch-Esperantisches Wörterbuch und umfaßt mit 3598 Wortstellen des Esperantoteiles und 3363 Wortstellen des deutschen Teiles den grundlegenden Wortschatz für die Technik ungefähr in demselben Umfange, wie der erste Band der bekannten Schlomannschen Illustrierten Technischen Wörterbücher — ITW. Der Verfasser erklärt in der Vorrede, die teure Herausgabe von Esperantowörterbüchern in der Doppelanordnung der ITW, als Terminologie und Wortverzeichnis, komme wegen des Mißverhältnisses zwischen den Buchherstellungskosten und dem Einkommen der meisten Käuferschichten nicht in Betracht. Er nimmt aber auf die begrifflichen Zusammenhänge Rücksicht, indem er zusammengesetzte und mehrteilige Ausdrücke stets bei demjenigen ihrer Bestandteile auführt, der als Oberbegriff zu werten ist, z. B. Dampfmaschine bei Maschine, Gußeisen bei Eisen. Dadurch wird ohne Erschwerung des Aufschlagens erreicht, daß sachlich zusammengehörige Ausdrücke tunlichst zusammenstehen, so daß man das Buch auch zu einer Erlernung des Wortschatzes benutzen kann. Bei den einzelnen Wörtern wird zur Platzersparnis nicht deren Übersetzung angegeben, sondern statt dessen nur durch Ziffern auf das entsprechende Wort des anderssprachigen Teiles hingewiesen. Daneben finden sich zahlreiche wertvolle Hinweise auf sinnverwandte Ausdrücke u. dgl. Solche ziffernmäßige Hinweise stellen freilich bei der Buchherstellung insofern eine gefährliche Klippe dar, als sie leicht zu Versehen und Druckfehlern Anlaß geben. Infolge sorgfältiger Durcharbeitung ist aber in dem neuen Wörterbuch die Zahl solcher Druckfehler verhältnismäßig recht gering, ein Verzeichnis der bei der Durchsicht gefundenen ist nachstehend abgedruckt; es ist von Herrn Wüster durchgesehen und ergänzt. Als wesentlich ist daraus anzuführen, daß in den Wortstellen 82.55 und 82.56 die Wörter geometrisch und trigonometrisch miteinander zu vertauschen sind, d. h. unter tangento ist die trigonometrische, unter tanganto die geometrische Tangente zu verstehen.

Nach der technischen Seite fand ich keine Fehler, im Gegensatz zu anderen — nicht nur esperantischen

— Wörterbüchern, wo man solchen allenthalben begegnet. (So fand ich in einem jüngst erschienenen, übrigens trefflichen Wörterbuch für Schweißstahl den Ausdruck ŝtalo veldbla, obwohl es sich dabei gar nicht um einen schweißbaren, sondern um einen aus zusammengeschweißten Paketen hergestellten Stahl handelt, den Wüster zutreffend als bulŝtalo oder veldŝtalo bezeichnet.)

Nach der sprachlichen Seite würde ich ein Eingehen auf geringfügige Meinungsabweichungen an dieser Stelle für verfehlt erachten; ungleich wichtiger als die Wahl des einen oder anderen von nahezu gleichwertigen Ausdrücken erscheint mir eine volle Einheitlichkeit nach der Richtung, daß den einzelnen technischen Fachausdrücken überall genau dieselbe Bedeutung beigelegt wird; das ist für ihre Einführung in die Technik unerläßliche Vorbedingung. — Weltsprachliche Fachausdrücke müssen nicht nur dasselbe Maß von Zweifelsfreiheit besitzen, wie die nationalsprachlichen, sondern ein höheres. Und was Zamenhof sagt über die Einführung neuer Wörter, deren Auslese durch die natürliche Entwicklung der Sprache und ihren Untergang durch Nichtgebrauch, das kann auf technische Fachausdrücke nur mit der Maßgabe Anwendung finden, daß deren Bedeutung im einzelnen von vornherein streng festgelegt und festgehalten wird. Es wäre zu wünschen, daß die folgerichtig aufgebaute Arbeit Wüsters nach dieser Richtung allgemein als Grundlage anerkannt wird.

Im übrigen erscheint, besonders für die technische Anwendung, auch eine zu große Anzahl von Esperantoausdrücken für denselben Gegenstand oder Begriff von Übel. Zu der von Zamenhof geübten Sparsamkeit — man denke nur an *patrino*, *malbona* — steht es in auffallendem Gegensatz, wenn man in unsern Wörterbüchern beispielsweise für „Fahrrad“ vier Übersetzungen, teilweise freilich mit gleicher Wurzel, vorfindet (*ciklo*, *biciklo*, *biciklo* und *velocipedo*, dabei wird zuweilen für einen der Ausdrücke die Bedeutung Hochrad angegeben, aber teils für *biciklo*, teils für *velocipedo*, so daß auch die Bedeutung nicht zweifelfrei ist, an anderen Stellen findet man keinerlei Bedeutungsunterschied vermerkt). Auch nach dieser Richtung kann eine Arbeit wie die vorliegende vereinheitlichend und bessernd wirken. — Damit das Wörterbuch als nie versagendes Hilfsmittel dienen kann, führt Wüster zwar alle bisher gebräuchlichen Esperantoausdrücke für dahingehörige Dinge an, setzt aber diejenigen, von deren Benutzung unbedingt abzuraten ist, in eckige Klammern (z. B. *giso* in der Bedeutung Gußeisen). Von diesem zweckmäßigen Mittel wird aber nur allzu sparsam Gebrauch gemacht, vielfach wird für bestimmte Gegenstände oder Begriffe eine ganze Reihe von Ausdrücken ohne Angabe eines Bedeutungsunterschiedes und ohne Klammern mitgeteilt. Auch nach Abzug der durch eckige Klammern ausgesonderten Ausdrücke ist die Zahl der Wortstellen des Esperanto-teiles noch um mehr als 200 größer, als diejenige des doch auch wortreichen deutschen Teiles. So findet man z. B. für „ein Lager schmieren“ *lagron lubriki*, *grasi*, *ŝmiri* (für „ein Lager ölen“ noch zwei weitere Ausdrücke); ein „Schneckenrad“ heißt *helica rado de vermo*, *ŝraŭbrado* oder *vermrado*,

usw. — Neuerdings fassen in der Technik die zwischenvölkischen Bestrebungen auf Vereinheitlichung und Normalisierung oder „Normung“, die sich auch auf einheitliche Bezeichnungen und dgl. erstrecken, immer mehr festen Fuß. Als Fachmann, der diesen Bestrebungen als Mitarbeiter nahesteht, muß ich es für notwendig erklären, daß die Zahl der endgültig einzuführenden technischen Fachausdrücke noch wesentlich vermindert und jede entbehrliche Mannigfaltigkeit beseitigt wird. Kleinsprachliche oder persönliche Rücksichten, die wahrscheinlich zur Beibehaltung so zahlreicher Ausdrucksweisen Anlaß gegeben haben, müssen bei Einführung einer Welthilfssprache in die Technik vor deren unmittelbaren Bedürfnissen zurückstehen, die aus der zwischenvölkischen Geltung sich ergebenden Schwierigkeiten überwunden werden! Schließlich muß den zu wählenden Ausdrücken durch Bestätigung von zuständiger Stelle Allgemeingeltung verschafft werden. Dazu wären übrigens in erster Linie nicht die Organisationen der Esperantosprache, sondern im Einvernehmen mit diesen arbeitende technische Stellen von hinreichendem Einfluß berufen.

In seiner gegenwärtigen Gestalt ist das Wörterbuch zunächst leider nur für die des Deutschen mächtigen Sprachfreunde bestimmt; hoffentlich folgen bald anderssprachige Ausgaben, für die der Esperantoteil unverändert beibehalten werden kann. Esperantokundige Franzosen, Engländer, Russen und Spanier können aber das Buch verwenden, wenn sie den ersten Band der ITW danebenlegen. Der Druck ist sehr klar, die äußere Ausstattung gefällig; die letztere aber leider Blendwerk, denn das Innere ist in minderwertiger Weise quer durch die Blätter geheftet, ein Verfahren, das z. B. für Preisverzeichnisse geeignet, für ein Nachschlagewerk aber durchaus unzulänglich ist.

(Im Interesse der Benutzer des Buches möchte ich noch eine neben Seite 1 unter „Abkürzungen“ gegebene schwerverständliche Erklärung erläutern. Es heißt dort neben der Abkürzung „abs.“: „absolut (= ohne Objekt: transitive Zeitwörter)“. Die eingeklammerten Worte solen besagen: *abs* bei einem transitiven Zeitwort bedeutet, daß dieses abweichend von der gewöhnlichen Anwendung ohne Beziehung auf ein Objekt gebraucht wird. Beispiel: „schlagen“ ist im allgemeinen transitiv, in der Wendung „die Uhr schlägt“ wird es aber ohne Beziehung auf ein Objekt gebraucht.)

Dr.-Ing. Ellerbeck

*Wüster: *Maŝinfaka E-vortaro priedementa*. Germana eldono: Germana-E kaj E-Germana kun nombro-indikoj.

Riĉenhava, zorgeme prilaborita vortaro. Ĝi montras preskaŭ la saman amplekson, kiel havas la unua volumo de la ĉie konataj ilustritaj teknikaj vortaroj (ITW) de Schломann. La aranĝo kun nombro-indikoj sekvigis kelkajn preserarojn, kiuj estas citataj ĉi-sube. La recenzanto opinias, ke la vortaro de W. prezentas taŭgan gvidilon por la ĝenerala enkonduko de teknikaj esprimoj, kies signifo kaj sencenhavo estu fiksataj unu fojon por ĉiam; sed li konsideras necese, malpligrandigi la nombron de la definitive akceptotaj fakvortoj post forigo de ĉiu malhavebla varieco. Pri la definitiva

akcepto decidu ne iu organizaĵo de la E-movado, sed teknikaj postenoj sufiĉe influhavaj, kiuj laboru en interkonsento kun E-organizaĵo kompetenta. — Esperanton sciantaj francoj, angloj, rusoj, hispanoj povas uzi la vortaron, kromuzante la unuan volumon de la menciita ITW-vortaro.

Druckfehlerverzeichnis

zu *Wüsters* Maschinentechnischem Esperanto-Wörterbuch

Preseraroj en *Wüster*: „Maŝinfaka Esperanto-Vortaro“, germ. eld.

Stelle Loko	Statt: Anstataŭ:	Lies: Legu:
p. V, 1. 5	ITW	ITWI
3.39	78.48	47.41
13.87	(23)	(83)
14.52	(en 16.29)	(en 5.30)
15.41	(25)	(35)
18.1	51.56	51.26
22.10	(14.18)	(14,18)
22.14	(10.18)	(10,18)
22.18	(10.14)	(10,14)
25.9	68.44	68.45
25.65	(lubrika) -	grasada - (lubrika) -
25.72	(12.20 oleo)	(21.20 oleo)
27.88	piano	aranĝo, - de piano
30.33	(31,35)	(21,35)
32.52	49.11	49.12
36.15	86.9	86.21
37.17	(39.36)	(39.35)
41.12	(70)	(40.70)
41.34	(en 18.55)	(en 18.53)
68.45	25.10	25.9
77.51	39.36	39.35
82.6	(Körper ähnlich; 5)	(Körper ähnlich 5)
82.55	(geometr.)	(trigonometr.)
82.56	(trigonometrisch)	(geometr.)

Habellok, Georg: Eisenbahnwörterbuch Deutsch-Esperanto. Zusammenstellung der im Eisenbahnverkehr gebräuchlichen Ausdrücke. Im Auftrage des Verbandes Deutscher Eisenbahn-Esperantisten bearbeitet. Breslau 1923. Selbstverlag des Verfassers, Breslau 10, Schleiermacherstr. 19. (49 S., 13,5×21,5 cm.) Gz. 0.50 M. [346]

Die allgemeinen Wörterbücher bringen nicht alle wissenschaftlichen und technischen Ausdrücke, die für Übersetzungen und Niederschriften auf den einzelnen Fachgebieten benötigt werden. Es übersteigt auch wohl die Kraft eines einzelnen Menschen, diese Ausdrücke in Esperanto für alle Gebiete zu sammeln oder zu schaffen. Darum ist es dankenswert, wenn Fachleute, die gleichzeitig in den Geist des Esperanto eingedrungen sind, diese Aufgabe für ihr Fach übernehmen und das Gefundene ausdrücklich der Kritik übergeben. Vergleiche mit den entsprechenden Arbeiten anderer Nationen werden zu endgültigen Festsetzungen führen. Im vorliegenden Heftchen geschieht das auf dem Gebiete des Eisenbahnverkehrs, -betriebs und -bürodienstes. Die Ausdrücke sind, soweit ich es beurteilen kann, gut gewählt; übersetzt sind sie so, daß klar Denkende und mit der Sache Vertraute mit dem Esperanto-

worte den rechten Begriff verbinden werden. Gewiß wird auf dem Wege des Vergleichs für manchen Begriff ein besserer Ausdruck sich finden lassen; auch wird die Auswahl vervollständigt werden können. Aber im ganzen bietet die Arbeit eine sehr brauchbare Grundlage, und es ist nur zu wünschen, daß alle Berufenen, dem Wunsche des Bearbeiters folgend, scharfe Kritik üben und an der Verbesserung rege mitarbeiten. Dem Bearbeiter gebührt nicht nur der Dank seiner Esperanto-Fachgenossen, sondern aller Esperantisten. G.

Habellok: Germana-Esperanto-vortaro por fervojistoj.

Bone elektitaj esprimoj. Terminoj facile kompreneblaj por fakuloj. La verkinto petas pri kritiko, esperante, ke bezonataj plibonigoj tiel estos atingataj.

Epton, Harry A.: Radio and the language difficulty. London 1923: The Wireless and Allied Trades' Review. (7 p., 12×18 cm.) Prezo ne montrita. [371]

La supre citita artikolo pritraktas la progresojn de radiotelefonio, la malfacilaĵojn rezultantajn por ties evoluo el la multlingveco de la mondo, la necesecon, elekti por la internacia interkomunikiĝo ununuran lingvon, la neeblecon, ke, pro la ĵaluzo de la nacioj, tiu lingvo povas esti nacia, la necesecon, elekti la facile lerneblan, en komerco, scienco, literaturo, trafiko kaj precipe ankaŭ en internaciaj kongresoj plej sukcese uzitan kaj de plej gravaj institucioj internaciaj rekomanditan, nepre neŭtralan lingvon Esperanto. Fine ĝi montras, kiel Esperanto povas esti enkondukata iom post iom en la radiotelefonan trafikon. Sur la lasta paĝo troviĝas resumo pri la strukturo de Esperanto. G.

Migliorini, B.: Manuale di Esperanto in dieci lezioni. Con due vocabolarietti. S. Vito al Tagliamento 1923: A. Paolet. (XVII, 128 p., 12×16,5 cm.) 2.50 Lire (1 sv. Fr.). [375]

Ĉi tiu lernolibro prezentas, post malgranda antaŭparolo, la plej gravajn informojn pri la problemo de internacia lingvo kaj pri la stato de la Esperanto-movado, 10 lecionojn (108 §§) „necesajn por legi, skribi kaj paroli Esperante“, vortaron Esperantan-italan kaj italan-Esperantan. La lecionoj enhavas gramatikajn kaj vortfaradajn regulojn kun ekzemploj, kaj ekzercojn konsistantajn el tradukotaj frazoj Esperantaj kaj parte italaj, kiuj laŭsence estas ligitaj. La gramatikaj reguloj estas kompletaj; ne mankas ekz. la informo, ke, en la esprimo, „unuĵ — la aliaĵ“ „unuĵ“ estas pronomo kaj pro tio povas havi la finaĵon de la multe-nombro; oni ankaŭ trovas la „principon de neceso kaj sufiĉo“ k. a. La nombro de la memorigotaj vortoj ne estas troa. La reguloj estas simplaj kaj klaraj, la ekzemploj lerte elektitaj. Zorgeme estas atentataj la diferencoj inter ital- kaj esperantlingvaj kutimoj, kontraŭbatalataj estas oftaj elparoleraroj de Italoj, ekz. mezo (z = c). „Pavimo“ (pĝ. 52) ne respondas al itala „pavimento“ = planko, pargeto. — Krom la en la libro mem korektitaj mi ne trovis preserarojn. La nova libro estas bona, rekomendinda lernolibro. G.

Memoru Plauen!

***Wüster, Eugen:** Die Verhältniswörter des Esperanto. Zugleich eine allgemeine Funktionslehre der Verhältniswörter seiner Quellsprachen. Berlin und Dresden 1924: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H. (36 S., 15 × 22,5 cm.) Fein kart. 1.25 Gm. [392]

Die vorliegende Studie bietet eine tiefgründige, erschöpfende grammatische und lexikographische Abhandlung. Sie stellt nach dem Vorworte den allgemeinen Teil einer Monographie dar, deren speziellen Teil die Artikel über die einzelnen Verhältniswörter in: Wüster, Enzyklopädisches Wörterbuch Esperanto-Deutsch (Verlag F. Hirt & Sohn, Leipzig) bilden. Sie behandelt nach einleitenden allgemeinen Erklärungen zunächst das *eigentliche*, dann das *uneigentliche* Verhältniswort. In dem Abschnitt über das *eigentliche* Verhältniswort wird geboten: das Verhältniswort selbständig als solches; als Bindewort des Verbum finitum und der Nennform mit einer Übersicht über die wichtigsten eigentlichen Verhältniswörter und die ihnen entsprechenden Bindewörter (z. B. dum, ĝis, antaŭ ol, por (ke), post kiam u. a.); als Umstandswort (z. B. ĉirkaŭ ungefähr, po); in erweiterten Präpositionalbildungen (z. B. porĉiam/a, elpaper/skatol(o), enmar/igi, senfort(o)/a, ĉirkaŭman(a)ĵo Armband, vizaĝalter/e mit dem Gesicht auf die Erde, ventantaŭ(e)/e am Winde = auf die Art, daß der Wind vorn ist); vorderwortartig im engeren Sinne, und zwar mit Adjektiv-elementen (z. B. kun/kulpa), mit Substantivelementen (z. B. antaŭ/parto), mit Verbalelementen (z. B. sur/versi akvon Wasser aufgießen, s. floron eine Blume (be)gießen; el/flati = flatakiri erschmeicheln en/iri, kun kapti), dazu Übersichtstabelle; Bildungen nach den zwei vorhergehenden Punkten als Schnitt-homonyme; selbständig weitergebildet, und zwar Präpositionaladjektiva und -adverbien (z. B. antaŭ/a oder -e, dangersen/a; ĉi-sub/a, ĉi-kun/e), Präpositionalsubstantiva (z. B. ĉirkaŭ o), Präpositionalverba (z. B. antaŭ/i), Verhältniswörter mit Suffixen (z. B. super/ema, en/aĵo, ekster/ulo, trans/ejo, an-tataŭ/isto, per/ilo, apud igi, al igi); Übersicht über das Vorkommen der 34 eigentlichen Verhältniswörter. Dann folgt ein Überblick über das *uneigentliche* Verhältniswort: Adverbialverhältniswörter (z. B. flanke de, konforme al, helpe de, danke -n oder al, sekve de, kune kun, dank' al = danko estu al); Gruppenverhältniswörter (z. B. en la daŭro de). — Der Verfasser erörtert wiederholt Verbesserungsmöglichkeiten, so die Möglichkeit einer größeren Regelmäßigkeit und Vereinheitlichung des jetzt unregelmäßigen Gebrauchs der Verhältniswörter als Bindewörter, z. B. ĝis anstataŭ tio ke, malgraŭ (tio) ke, antaŭ ol, post kiam anstatt etwa eines einheitlichen ĝis ke, antaŭ ke, post ke usw. Er gibt aber dabei gewissenhaft den *geltenden* Sprachgebrauch der Musterautoren an und warnt sogar hier und da, auf eigene Faust vom geltenden Sprachgebrauch abzugehen. Die vorliegende Studie ist leichter verständlich als z. B. des Verfassers: La tri fundamentaj reguladoj (Esperanto Triumfonta 1921, Nr. 55-58), erfordert aber trotzdem mehrmaliges Lesen und sehr gründliches Durchdenken. Wer sich aber diese Mühe nicht verdrießen läßt, wird sich praktisch im Esperanto vervollkommen, zugleich aber tiefer eindringen in den Geist der Esperantosprache und

Vogtlanda Svisujo. Ĉu vi jam konas ĝin? Plej bona okazo por vizito estas la XIIa Germana Esp.-Kongreso, Pentekoston 1924, en Plauen

zugleich in das Wesen sprachwissenschaftlicher Forschung und damit reichen äußeren und inneren Gewinn davontragen. Die äußere Ausstattung ist gut. Die Broschüre kann jedem strebenden Esperantisten aufs angelegentlichste empfohlen werden. G.

***Wüster:** La prepozicioj de Esperanto.

Kompleta kaj tre ekzakta studaĵo pri la prepozicioj en E; ĝi traktas la veran kaj la ne-veran prepozicion, vortformojn prepoziciajn k. s. La aŭtoro proponas kelkajn plibonigojn rilate al pli granda unuformeco kaj unuecigo en la uzo de prepozicioj kiel konjunkcioj; sed li ankaŭ avertas kontraŭ tro rapidema forlaso de la nuna kutimo.

Esperanto-Institut für das Deutsche Reich

Leiter: Dr. Dietterle, Leipzig-Schleußig, Seumestr. 10
Postscheck-Konto des Instituts: Leipzig Nr. 57909

Statistik für 1923

(Wichtig für alle deutschen Esperantisten)

An eine umfassende Statistik für die Bewegung in allen Ländern, die der Institutsleiter als Mitglied des Centra Komitato übernehmen und bearbeiten möchte, ist leider (aus Gründen, die hier nicht ausgeführt werden können) für 1923 noch nicht zu denken. Daher müssen wir für das Jahr 1923 noch einmal eine Statistik nach dem Muster der vorjährigen für 1922 aufstellen.

Ich bitte also darum, daß dem Institut wiederum die *Meldungen über die Bewegung im Jahre 1923* nach dem Schema für 1922, welches noch einmal angegeben wird, zugestellt werden, und zwar *bis spätestens 15. März*. Dabei bitte ich folgendes zu beachten:

1) *Alle* Gruppen, ganz gleich, ob dieselben irgendwie organisiert sind oder nicht, auch Privatzirkel usw., desgleichen *alle* Schulen aller Gattungen sollen ihre Meldungen einreichen. Es ist dies von größter Wichtigkeit, wenn die Statistik den Zweck erfüllen soll, den sie hat, nämlich den Behörden einen zuverlässigen Bericht über die Entwicklung der Bewegung zu geben. Der E-Arbeiter-Verband für das deutsche Sprachgebiet hat die Fragen des untenstehenden Schemas bereits in seine Fragebogen für 1923 aufgenommen und dem Institut die Einsendung der Gruppenberichte zugesagt.

2) Jede Gruppe und Schule wird gebeten, auf einem besonderen Bogen in Großquart oder Aktenformat zu berichten, damit das ganze Material handlich und übersichtlich ist.

3) Die einzelnen Fragen sind nur mit Ziffern so zu beantworten, daß man sofort sehen kann,

welche Frage durch die Ziffer beantwortet wird. Eine Wiederholung des Textes der Frage ist nicht nötig.

4) Jeder Bericht soll die Unterschrift des Berichterstatters enthalten und dazu dessen derzeitige Anschrift; diese letztere ist für eine Kartothek, die fortlaufend zu ergänzen und zu berichtigen ist, unbedingt erforderlich.

5) Wo die Leser unserer Bundesorgane Kenntnis von Gruppen, Privatziirkeln usw. haben, die nicht organisiert sind, von Schulen, in denen der E-Unterricht durch Lehrer erteilt wird, die weder dem Verband der Deutschen Esperantistischen Lehrer noch irgendeinem anderen Verbands angehören, also von Gruppen und Schulen, in denen weder der Germana Esperantisto noch der Arbeiter-Esperantist gelesen wird, werden die betreffenden organisierten Esperantisten gebeten, auf die Statistik aufmerksam zu machen. Der Zweck derselben ist nicht, jemanden in eine Organisation zu pressen, der sich in eine solche nicht einzugliedern vermag, sondern nur der, den Behörden die tatsächliche Verbreitung des E vor Augen zu führen.

6) Die Statistik für 1923 wird voraussichtlich kein besonders erfreuliches Bild bieten, da die wirtschaftlichen Verhältnisse, namentlich gegen Ende des Jahres, sehr störend gewirkt haben. Die Berichte sollen dessenungeachtet auch da, wo wenig erfreuliche Resultate zu melden sind, die Ziffern der Wahrheit gemäß angeben.

7) Das Resultat der Statistik wird s. Z. den Verbänden und den Verbandsorganen mitgeteilt werden.

8) Das Institut wird diesmal nicht, wie im vorigen Jahre, wegen Einsendung der Meldungen mahnen. Es hofft, daß die Wichtigkeit einer alljährlichen statistischen Erhebung keiner weiteren Begründung bedarf. Sie erfolgt nicht im Interesse des Instituts, sondern allein im Interesse der Bewegung.

I. Schema für die Gruppen

(Unter deutlicher Angabe des Ortes auf der 1. Seite des Berichts rechts oben)

1) Name der Gruppe? 2) Zu welchem Verbands gehörig? 3) Zahl der Mitglieder: a) am 31. Dezember 1922? b) am 31. Dezember 1923? 4) Zahl der abgehaltenen Kurse? 5) Zahl der Kurssteilnehmer, die sich gemeldet haben? 6) Zahl der Kurssteilnehmer, die bis Ende des Kursus ausgehalten haben? 7) Zahl der Kurssteilnehmer, die in die Gruppe eingetreten sind? 8) Wieviel Kursleiter haben zur Verfügung gestanden? 9) Wieviel davon waren Berufslehrer? 10) Wieviel Lokale sind von örtlichen Behörden, von Schulen usw. zur Verfügung gestellt worden?

II. Schema für die Schulen

1) Name, bez. Nummer der Schule? 2) Art der Schule? 3) Zahl der Klassen, in denen E-Unterricht erteilt wurde? 4) Zahl der Schüler: a) ab 1. Januar bis Ostern 1923? b) ab Ostern 1923? 5) War der Unterricht a) obligatorisch? b) fakultativ? c) privat? 6) Wieviel Lehrer sind an demselben beteiligt gewesen?

Lederer-Hell-Stiftung. Die Entscheidung betreffs des letzten Preisausschreibens erfolgt diesmal verhältnismäßig spät. Das liegt daran, daß von den eingegangenen Arbeiten nach der Meinung der Preisrichter keine den zu stellenden Ansprüchen genügte. Es wurde daher von dem Institutsleiter vorgeschlagen, diesmal von einer Prämierung abzusehen. Um ganz sicher zu gehen, hat er dann die eingegangenen Arbeiten erst noch an Herrn Hell eingesandt mit der Bitte, daß dieser sein Gutachten abgebe, und danach diejenigen Arbeiten, die noch als die verhältnismäßig besten zu bezeichnen waren, Herrn Dr. Lippmann zur Durchsicht übergeben. Die beiden genannten Herren haben dem Vorschlage des Institutsleiters glatt zugestimmt, zumal keine einzige der eingegangenen Arbeiten frei von grammatikalischen Fehlern war, was doch wohl unbedingt bei einem solchen Preisausschreiben vorausgesetzt werden muß. — Die Umschläge, welche die Namen der Einsender enthalten, sind ungeöffnet vernichtet worden. — Das Preisausschreiben für 1924 wird demnächst bekanntgegeben werden. Hoffentlich lassen sich durch das Resultat von 1923 diejenigen nicht entmutigen, welche Lust haben, sich an demselben zu beteiligen.

Finanzielle Hilfe für das Institut. Bis 25. Januar 24 sind für das Institut nachfolgende Beiträge eingegangen, über die hierdurch mit herzlichem Danke quittiert wird (*in G. M.*): Gruppe Essen 1910 5; Istel, Wiesbaden 1; Felix Epstein, Hamburg 5; Vendreda Klubo, Leipzig 6; Pillath, Essen 6.

Esperanto-Institut für das Deutsche Reich
Dr. Dietterle

Leipziger Frühjahrsmesse 2. bis 8. März 1924

Das Institut stellt bekanntlich sein Büro während der Messetage als „Renkontejo“ für die esperantistischen Besucher der Messe zur Verfügung. In diesem internationalen Treffpunkt haben sich während der letzten Messen die Angehörigen aus 15—20 Nationen regelmäßig zusammengefunden. Ebenso haben dieselben den „Internationalen Abend“, welcher für sie am Dienstag Abend der Meßwoche veranstaltet wird, besucht. Es ist sehr wünschenswert, daß auch die deutschen Esperantisten die Verpflichtung fühlen, sich wenigstens in die Liste des Renkontejo einzutragen und die ausländischen Esperantisten zum Internationalen Abend zu begrüßen. (Dieser findet voraussichtlich Dienstag, den 4. März, abends 8 Uhr, im Pauliner Haus, Karolinenstraße 5, statt.)

Im esperantistischen Messetreffpunkt können alle Messesachen (Meßabzeichen, Meßadreßbuch usw.) gekauft werden. Es ist wünschenswert, daß auch die deutschen Esperantisten von dieser Möglichkeit Gebrauch machen, damit dem Meßamt gezeigt werden kann, wieviel Esperantisten sich unter den Messebesuchern befinden.

Oni atendas vin en Plauen!

Esperanto-Praktiko

Instrua kaj literatura gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia

6a Jaro No. 1-2 (60-61)

Fondinto kaj Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek
Respondeca Redaktoro: Arnold Behrendt

Jan.-Febr. 1924

Rozfabelo

De Adolf Stark

Kiel la rozoj odoras en via hararo! Kaj kiel strangaj ili estas! Ankoraŭ neniam mi vidis tiajn rozojn: blankaj ili estas kaj tamen verŝumitaj kvazaŭ per sango. Kaj jen, kio estas tio? Ĉe la trunketo gluas sango. Vi opinias, ke ĝi devenas de viaj fingroj, vi eble estas ŝirinta vin je dorno? Sed vidu, viaj fingroj estas sanaj, mi prenas ilin inter la miaj kaj kisas ĉiun el ili kaj serĉas la malgrandan vundon kaj ne trovas ĝin.

Mi tuj sciis! Ne estas via sango, kio ŝprucas el la rozoj, ĝi estas la propra sango de la floroj. Ĉar efektive tute ne estas rozoj, sed — tamen tio estas vera rakonto, fabelo. La vento ĝin rakontis al mi aŭ eble la rozujo mem, kiam mi dormis tagmeze sub ĝi. Ĉu vi volas aŭdi ĝin?

Tie sube ie, en la sunplena sudo, eble sur iu feliĉa insulo, kiu hodiaŭ ne plu ekzistas, ĉar la envio de l' dioj fortiris ĝin en la marfundon, la envio de l' dioj, kiuj ne povis toleri, ke homoj, homoj ternaskitaj, povis esti pli feliĉaj ol ili mem, — sur tiu insulo vivis iam princino, kiu estis inter ĉiuj belaj homoj de tiu insulo la plej bela. Tiam kunvenis la saĝuloj de la lando kaj interkonsiliĝis, kion fari, por konservi al la mondo tiun ĉi miraklon je beleco kaj gardi ĝin kontraŭ la dento de la tempo ĉion detruanta. Ili decidis, kunvoki la plej famajn pentristojn de la epoko, por ke ili pentru la princinon, kaj tiamaniere almenaŭ per portreto restigu al la postularo ŝian belecon.

Kaj ili venis, la famaj viroj, kiuj jam donis al la mondo tiom da beleco; ili admiris la miraklon je beleco kaj fiksis ĝin per siaj penikoj sur tolaĵon. Sed kiam ili estis finintaj sian laboron, tiam eĉ ne unu el la bildoj estis komparebla al la originalo; la majstroj detruis siajn verkojn kaj foriris, sciigante al la mondo, ke neniu estus kapabla, reprodukti tiun miraklon je beleco.

La informo iris tra la tuta mondo; ĝis en nia nordo ĝi venis, kie regis tiam potenca reĝo. Tie transe sur monteto staris lia kastelo, kaj la erikejo antaŭ ĝi, sur kiu kreskas hodiaŭ nur genistoj kaj erikoj, estis floranta ĝardeno. Nenio de ĝi restis, nur la rozujo, kiu portas la ruĝajn rozojn sangoversumitajn kaj ploras sangajn larmojn, se oni deŝiras ilin.

Sed tiu reĝo estis jurinta al si mem, nur edziĝi al la plejbelulino sur la tuta tero. Tiam li venigis la plej bonan majstron de sia regno kaj ordonis al li, vojaĝi al sudo, por pentri portreton de la princino kaj alporti ĝin. Sed la majstro jam havis tre altan aĝon kaj timis la malproksiman vojaĝon. Tial li sendis sian preferatan disciplon.

Kaj la junulo pentris la bildon de la princino.

„Vi devas rigardi min“, li diris al ŝi, „por ke mi vidu viajn okulojn.“ Tiam ili rigardis en la okulojn unu al la alia. „Vi rigardas tiel serioze“, li diris. Tiam ŝi ridetis al li. Kaj li pentris ŝin tiel, kiel ŝi rigardis lin kaj ridetis al li. Kiam li estis fininta sian laboron, li adiaŭis ŝin. Tiam ŝi donacis al li blankan rozon, kiun ŝi kisis antaŭe. Sed dorno estis, pikinta ŝin en la lipon tiel, ke aperis malgranda sangruĝa makulo sur la rozo. Tiun li portis ĉe la koro, kiam li veturis hejmen.

Sed lia majstro prenis la bildon, alportis ĝin al la reĝo kaj fiere parolis pri la beleco de la princino. La reĝo ne diris eĉ unu vorton kaj rigardis longtempe la bildon. Tiam li firme ekkaptis la maljunulon kaj kriis: „Vi volas trompi min, grizulo! Ĉi tiun bildon vi certe ne pentris. Ĉi tiun bildon iu pentris, al kiu la sango fluas varmege tra la vejnoj, kaj al kiu iris la beleco tra la okuloj en la sangon. En la sangon kaj en la koron!“

Tiam la majstro konfesis, ke li sendis la lernanton. La reĝo igis lin solene promesi, ke li silentu, kaj ordonis al li, ke la pentristo venu dum la vesperhoroj en la ĝardenon, tiel, kvazaŭ iu atendas lin tie. Sed kiam la junulo atendis en la ĝardeno, jen la reĝo sin jetegis sur lin, traboris lin per sia glavo kaj enterigis la kadavron en la ĝardeno. Tiam li ekipis senditaron, forsendis ĝin al la feliĉega insulo kaj igis peti la manon de la princino.

La belulino ĝis nun estis rifuzinta ĉiujn svatantojn. Sed kiam alvenis la senditaro, tiam ŝi diris jes. Ĉar ŝi esperis revidi la pentriston.

Kiel seniluziĝita ŝi estis, kiam ŝi vidis post la ekloĝo en sia regno kiel kortegan pentriston la maljunan grizkapan majstron. Ŝi sekrete demandis, sed neniu sciis ion pri la junulo, kaj la du solaj, kiuj sciis pri tio, la reĝo kaj la majstro, silentis kiel la tombo. Tiam la princino fariĝis malĝoja kaj malsaniĝis, kaj la plej famaj kuracistoj ne sciis helpi ŝin.

Dume fariĝis printempo. Sed en la ĝardeno, sur tiu loko, kie estas enterigita la junulo, ekfloris rozujo, kiu portis blankajn rozojn, kaj ĉiu el ili havis sangruĝan malgrandan makulon, kiel tiu rozo, kiun la princino donis al la junulo. Tiun li estis portinta sur la koro, kiam la ŝtalo de la reĝo traboris lin, kaj lia korsango revekis la floron sekigintan je nova vivo, tiel ke ĝi naskis radikojn, kaj kreskis trunko kaj floroj. La kompatinda mortanta reĝino ekflaris en sia lito la odoron de la rozoj. Ŝi petis, ke oni elportu ŝin en la ĝardenon kaj kuŝigu sub la rozujon. Kaj tiel okazis.

Tiam alvenis ventospiro, movis la rozujon, kaj la blanka floro malleviĝis suben al la buŝo de la reĝino, kvazaŭ ĝi volis kisi ŝiajn lipojn. La mortantino

fermis la okulojn, feliĉega rideto radiigis ŝian vizaĝon, kaj ŝi murmuretis: „Mi sciis, amato, ke ni trovos unu la alian.“ Kaj poste ŝi mortis.

La reĝo, kiu jam antaŭe estis severa kaj perforta viro, nun fariĝis duoble kaj trioble tia. Nur batalo kaj milito estis lia celo. Kiel malbona fulmotondro li atakis siajn najbarojn. Tiuj ĉi interligiĝis kaj ekmarŝigis armeojn. La reĝo estis batata kaj lia regno detruata, lia palaco estis egaligata al la terfundo. Nenia ŝtono atestas pri la iama belegeco, genisto kaj eriko kreskas, kie estis antaŭe la floranta ĝardeno. Nenio restis, nur la rozujo, kiu portas la sangverŝuintajn rozojn kaj kiu al revulo, kia mi estas, rakontas en la silento de tagmezo antikvajn fabelojn.

El la Germana trad. *Hans Stahl*

Aerbatalo

De *H. Möllenberg*, Bremen

Estas nokto. — Tria horo frumatene. — Neniu kreaturo estas videbla kaj aŭdebla. Ĉio dormas kaj sonĝas. La malhela ĉielo estas kovrita per sennombraj steloj briletantaj diamante. —

Motoristoj tiras el aviadilejo du maŝinojn por fari ilin pretaj por krepuska flugo. Oni ekzamenas la aparatojn, oni ĉefe provas iliajn motorojn. Iom pli malfrue mi alvenas kune kun leŭtenanto v. T. Aerbatalo okazos inter ni. Post surmeto de la pilotaj vestaĵoj mi karese rigardas mian aviadilon kaj sidiĝas en ĝi por kontroli mem la funkciadon de la motoro, dum kiam la maŝino estas tenata firme sur la tero. Iom post iom mi plirapidigas la motoron, ĝis kiam la antaŭentirilo rotacias en unu minuto 1460 fojojn. Laŭte ĝi bruegas tra la krepusko. Nun la motoro estas pli kaj pli malrapidigata. „Bone funkcias“, mi diras al la maŝinisto. „Deprenu la haltigilojn de antaŭ la radoj.“

Tagiĝas! Oni ekrimarkas la matenkrepuskon. La subhorizonta suno ruĝigas la noktan ĉielon. Nebula vualo ankoraŭ flugpendas super la dormanta tero. La pejzaĝo pli kaj pli estas videbla. Laŭ interkonsento kun mia kontraŭulo la du maŝinoj trovu sin 4000 metrojn super la flugkampoj, kie okazos la batalo.

Je la tria kvardek kvin:

Du aviadiloj leviĝas kiel grandaj birdoj. Ĉiu aparato flugas sian propran vojon.

Je la kvara kvin:

4000 metrojn super la tero. Estas malvarme. Glacie la vento fajfas. La antaŭentirilo unutone rotacias. Sola mi estas en mia aparato, ĝi estas ĉasaviadilo. Blanke brilantaj nuboj preterrapidas, sed mi povas flugi pli rapide ol ili. Mi povas ĉirkaŭflugi ilin. Ha! Kian forton mi posedas per la aparato! Mi sentas min reĝo, eĉ Dio de l' aero. Nun piloto, priatentu, por ke vi povu pafi teren la alian maŝinon. Neatento estas morto. Kiel de vulpo miaj okuloj tra la okulŝirmilo ĉirkaŭvidas, precipe malantaŭen, ĉar mia aparato nur povas esti trafata de malantaŭe. Mi miavice nur povas pafi antaŭen tra la antaŭentirilo. Du maŝinpaŝilojn mi havas, kiuj obeas al delikata premo de fingro sur prembutonon. —

Salutas min la majeste leviĝanta, por la tero ankoraŭ subhorizonta suno kaj orumas la preterflugantajn nubojn. Kia neforgesebla aspekto! — —

Ho! La kontraŭa maŝino! Jen! fluganta rekte antaŭ mi, iom pli malsupre ol mi mem. Bonŝanco! Mi glitflugas, ĉiam restadante super mia kontraŭulo. Rapide la distanco malgrandiĝas. En la sama momento la malamika piloto ekvidas min kaj tuj ekkonas la danĝeron de la situacio. Nun la flugado en kurblinioj komenciĝas por ĉiu piloto. La aviadiloj turniĝadas kiel agloj. Venkos tiu, kiu plej bone povas majstri sian maŝinon. Pli kaj pli mi klinas la aparaton por atingi la momenton de la pafeblo. Ĉar mi estas en la pli bona situacio, la kuraĝo, klini la aparaton, pli kaj pli kreskas, ĝis kiam ĝiaj portilaj surfacoj preskaŭ montras teren kaj ĉielon. Malgranda nur estas la distanco, tiel ke mi bone povas ekkoni la trajtojn de la piloto. Nun! Tondras salvo boncelata! — Venkinto! Se la batalo ne estus ekzerco inter fluglernantoj, la trafita maŝino estus difektita, eble tiel, ke ĝi flamante falegus profunden.

1700 metrojn alte super la tero la batalo estas finita.

Sed nun la seriozeco de la afero komenciĝas, kaj en tiu ĉi dua batalo la morto estas mia kontraŭulo. La aparatoj ankoraŭ flugadas en malvastaj kurblinioj. Post mia venko mi nun volas preni mian maŝinon el la kliniĝo. Sed, subite — — la direktiloj ne obeas. Mi volas flugi horizontale, sed vane — vane. La aviadilo restas en sia kruta kliniĝo. La alia maŝino forflugis. Sola mi estas — kun la morto, kun kiu mi nun batalas la plej teruran batalon de mia vivo. Pli kaj pli la kapo de la maŝino terenkliniĝas, pli kaj pli pli krute. La antaŭentirilo bruegas. Ĝi nun turniĝas 1600 fojojn en unu minuto. La aparato estas rapidege falanta, ĉiam turniĝante ĉirkaŭ la longakso.

Falego! Diable la vento fajfegas tra la metalfadenoj de la aparato. — La morto ridetas. — La tero estas proksima, la plej danĝera malamiko de ĉiu piloto. La rapideco pli kaj pli estas akcelata, ĉar nun efikas dum la falego unue la pezo de la aparato kaj due la malsuprentiro de la motoro. Se mi nun ne povas remajstri la aviadilon, mi estas nur malmultajn sekundojn antaŭ la morto. Instinkte mi laŭte ekkrias. — — — Sed la bruegado de la antaŭentirilo superbruas ĉion. Neniu aŭdas la ekkrieton de la homo alte en la aero, kiu nun batalas por sia vivo. Sed — nur momente mi estas ekscitata — poste mi agas. Mi memoras pri sama okazintaĵo malfeliĉa. Tiu piloto mortis, kaj nia fluginstruisto klarigis poste la situacion. En kurblinioj ŝanĝiĝas la direktiloj. — Tial: gason for! Malsuprendirekti! Flankdirekti maldékstren! Iom post iom la turniĝo ĉirkaŭ la longakso malrapidigatas. La aviadilo baŭdaŭ glitflugas. Tiel mi flugas kelkajn sekundojn, por ke la nervoj kvietiĝu. La altmezurilo montras 700 metrojn. La aparato trafalis 1000 metrojn. Ĉio okazis dum sekundoj. Mi nun flugis teren, kaj post kelkaj minutoj la granda birdo staris firme sur la tero. Ĉiuj pilotoj de la fluglernejo tuj venis al mi por demandi min pri la danĝera okazintaĵo. La gvidanto de nia lernejo gratulis min je la venko pri la kontraŭa piloto kaj — je la venko pri la morto. — — —

Estis mia unua falego. En postaj tempoj, falegante memvole kun ĉasaviadilo, mi ofte memoris pri tiu ĉi falego nevolita.

La simbolo de l' amo*)

Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
„Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
„Min nutras denove patrino la tero,
„Pacience atendas mi ĝis la somero.“

Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandon balancan kaj brilekoloran!

„Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian,
„Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
„Pro amo mi miajn floretojn defendos,
„Pro amo mi miajn pikilojn forsendos.“

Al vento ĝi florfoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo, simbolo de l' amo vi restas,
Pacienca, alloga, kuraĝa vi estas.

Spritaĵoj

Simileco

„Jen la portreto de via filo, sinjorina moŝto.“
„Ĝi tre similas al li!“
„Li ankoraŭ ne pagis ĝin.“
„Tio eĉ pli similas al li!“

Librovendado

Aĉetanto eniras librovendejon por aĉeti la dramon „Die Ehre“ (La Honoro) de Sudermann. Inter li kaj la librovendisto okazas jena interparolo:

A. (salutante): „Mi havas la honoron!“

V. (dankante): „Mi havas la honoron!“

A.: „Ĉu vi havas La Honoron?“

V.: „Mi havas La Honoron.“

A. (prenante la libron kaj pagante): „Mi havas la honoron.“

V. (redonante troan monon): „Mi havas la honoron.“

A. (adiaŭante): „Mi havas la honoron!“

V. (same): „Mi havas la honoron!“

Kapabla advokato

„Ĉu la fama pledanto sukcesis faktigi vian malkondamnon?“

„Tio ja ne tute okazis, sed li almenaŭ konvinkis min, ke mi estas senkulpa.“

Prilingvaj Diskutoj

El diversaj fontoj

Laŭ mia opinio la titolo „Parencaj vortradikoj en E.“ estas nepre ne ĝusta. Dro Francke ne kompilas vortradikojn, sed vortojn. La kompilitaj vortoj ne estas parencaj sed sinonimaj.

S-ro Minor en n-ro 5, p. 69, de E. P. turmentas sin pro *dum* en la frazo „vi rajdas sur la besto, dum la kompatinda knabeto piediras“. Sprite li pledas por „dum kiam“, kiun mi ankaŭ taksas tre bona, dum kiam aŭ dume li tute forgesis menci *dume*, kiun li mem kelkfoje aplikas en „Natan la Saĝulo“, ekz. p. 120: „Vi ja jam dume tie estis.“

En E. P. p. 75 tekstas: „... ĉar Julio Cezaro jam en la jaro 46 antaŭ nia kristana *ero* estis koninta tian.“

P. 74 oni legas: „... kaj detale pritraktas mallongajn *erojn* de nia lingvo.“

Oni estas preskaŭ tentata, en *ambaŭ* frazoj traduki la vorton *ero* per *Zeitabschnitt*, *Zeitraum*, *Epoche* — en la unua frazo certe pli bone per *Zeitrechnung* = *Zeit*, *Epoche*.

La vorton *ero* oni trovas en neniu vortaro aŭ radikaro. Laŭ Dro Fr. Düsel „Verdeutschungen“ estas *Epoche* = *Zeitabschnitt* = *-punkt*, *-marke*, *-wende*, *-grenze*, *-raum*, *-spanne*, *-alter*, *-rechnung*, *Zeit* ktp. Do por la unua frazo taŭgas pli bone *epoko*. Ĉu *ero* en la dua frazo taŭgas aŭ ne, estas afero de la gusto.

Kvankam ankaŭ *Lippmann* permesas la vorton *ero* = *Zeitrechnung*, mi tamen pledas por tio, ke oni evitu tiajn vortojn, kiuj ofte devigas la leganton, diveni la enhavon de la legaĵo.

Lippmann mem ja citas la vorton *tempkalkulo*. Laŭ mia opinio *ero* neniam estas tradukebla per *Zeitrechnung*, sed nur per *Zeitabschnitt* ktp.

En *K. Loy*, *Taschenwörterbuch*, p. 116, sub *üben* oni legas: (via) „tra (m. Wenfall)“. Tio kontraŭdiras al la regulo: Post *tra* neniam sekvas la akuzativo, ĉar *tra* jam esprimas la direkton. La vorto „via“ en ĉi tiu loko estas por mi nekompren-ebla.

Kritikemulo

Al s-ro kritikemulo!

Parencaj vortradikoj: Vi estas prava, sed vi estas eble la sola leginto, kiu konstatis ĉi tiun subtilaĵon, kiu certe ne estas grava.

Dume: Laŭ mia opinio mi ne turmentis min, sed vi eraras! Vi ne aprobu mian proponon rilate al *dum ke*, sed vi ne povas rekomendi *dume* anstataŭ tio. Mi ne forgesis la vorton *dume*, sed ĉi tiu vorto tute ne estas koncernata. Mi proponis *dum ke* en la „kontraŭstariga“ senco de la Germana vorto *während* (=wohingegen), sed „dume“ ne estas taŭga por tio, ĉar „dume“ signifas „dum tio“: „Mi estis ĉe la sultano, kaj vi dume (dum tio, dum tiu tempo) estis ĉe mia filino.“ — „Mi estis ĉe la sultano, dum kiam (während der Zeit, während welcher) vi estis ĉe mia filino.“ — „Mi estis ĉe la sultano, dum ke (wohingegen) vi estis ĉe mia filino.“ —

Ĉu vi nun komprenas la diferencon, kiun mi celas?

*) El „Sableroj“ de Marie Hankel. Okaze de la Va Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono 1909 la verkinto ricevis pro ĉi tiu poemo la unuan premion en la „Floraj Ludoj“ kaj fariĝis „Reĝino de la Floraj Ludoj“. — La libreto „Sableroj“ ankoraŭ estas havebla (treste granda provizo!) ĉe nia librejo kaj kostas 0.40 Gm.
Red.

Ero: Kvankam „la vorton *ero* oni trovas en neniuj vortaroj aŭ radikaro“, ĝi tamen estas korekta — en ambaŭ sencoj: *einzelnes Teilchen* kaj *Zeitrechnung*. *Ero* signifas *einzelnes Teilchen*, ĉar *-ero* estas fundamenta sufikso kun ĉi tiu signifo, kaj la sufiksoj povas (laŭ § 11) esti uzataj kiel memstaraj vortoj. *Ero* signifas „Ära“ 1) ĉar tio estas internacia vorto, kiu per si mem estas Esperanta laŭ § 15; 2) ĉar Zamenhof diras, ke *ero* signifas *Zeitrechnung* (Lingva Respondo I, 24). Via propono: uzi anstataŭe *epoko*, ne estas bona, kio estas tuj pruvebla per la citita de vi frazo mem (post ellaso de la vorto „kristana“): „Julio Cezaro jam en la jaro 46 antaŭ nia *ero* estis koninta tian“ estas klara. Se oni metus anstataŭe „epoko“, la klareco jam estus pli duba; sed se eĉ oni simple dirus:

„Fiksa kalendo jam estis konata antaŭ nia epoko — antaŭ nia *ero*“,

vi tuj sentos la diferencon, ĉu ne?

Tra: Vi citas „p. 116“ kaj volas diri „p. 166“. Ankaŭ ĉi rilate vi estas malprava. Se la vorto „(via)“ estas por vi nekomprenebla, mi volas „komprenebligi“ ĝin al vi: ne temas pri la Esperanta poseda pronomo „via=dein“, sed pri la itala esprimo „via=über“, ekz.: „Das Paket geht von Hamburg nach Nürnberg via Würzburg.“ Vi opinias, ke „post *tra* neniam sekvas la akuzativo“, *Loy* opinias, ke jes. Nu, mia opinio estas jena:

I. Mi konsideru jenajn 2 frazojn:

a) Dum mia vojaĝo tra Germanujo mi ankaŭ venos al L.

b) Se oni veturas de Rusujo al Francujo, oni vojaĝas tra Germanujo(n).

En la unua frazo *tra* signifas *interne de*; en la dua — „de unu loko ekstere al alia loko ekstere, ĝin tranĉante“. Do se oni diras — kiel oni devas en Esperanto —, ke la akuzativo aŭ nominativo ne dependas de la prepozicio, sed de la verbo, oni devas konstati, ke: en la unua frazo oni demandas „mi vojaĝas ... kie?“, en la dua — „mi vojaĝas ... kien?“ Kaj oni povas uzi la akuzativan *n* en la dua frazo, kvankam Germanujo ne estas la rekta komplemento; sed oni ja ankaŭ uzas la akuzativan *n* en aliaj okazoj, metante ĝin al la nerekta komplemento. Fakte ankaŭ Zamenhof ofte diras „tra la fenestron“, rezonante: „li rigardas tra la fenestro = li rigardas (sur la straton, estante kuŝanta) tra la fenestro“, „li rigardas tra la fenestron = li rigardas (sendante la rigardon) tra la fenestron“. (Simile estas rilate al *kontraŭ*).

II. Se oni tute ne konsideras la signifon de *tra*, sed se oni demandas: „kion signifas la direkton montranta *n*?“, oni devas respondi: *n* signifas „al la loko ...“, ekz.: li saltas sur la tablon = li saltas al la loko „sur la tablo“ ktp. Se oni rezonas tiel, oni devas diri, ke oni ne povas uzi la akuzativon post *tra*, sed tiakaze oni diru, ke oni povas ofte uzi la akuzativon post *ĉe*: „mi sendis lin al la loko ĉe mia amiko“ = „mi sendis lin ĉe mian amikon“.

Resume: oni ne povas simple diri „la akuzativo post „tra“ estas korekta aŭ malkorekta“, sed oni devas diri: aŭ: se la akuzativo povas esti korekta post *tra*, ĝi dependas de la prepozicio kaj ankaŭ povas esti korekta post *kontraŭ* — aŭ: se la akuzativo ne povas esti korekta post *tra*, ĝi dependas de la verbo kaj povas esti korekta ankaŭ post *ĉe*. — La dua opinio ŝajnas al mi pli aprobinda. *Karl Minor*

Mem aŭ sin?

En numero 12 de *Esperanto* mi legas sur paĝo 225: „... Sokrata konsilo: *gnothi se auton*, t. e. konu sin mem“.

Treege mi miras pri la (laŭ mia opinio) nepre malĝusta traduko de la greklingva citaĵo. Unue: *gnothi* ne signifas „konu“, sed „ekkonu“ aŭ eble „konigi“; due: ĉar estas uzata la ordona verbformo, per kiu estas alparolata iu persono, temas en la frazo pri la dua persono; la refleksiva vorto „si“ ne rilatas al dua persono, sed nur al tria; sekve ĉi tie estas uzebla nur la pronomo de la dua persono, nome „vi“. La ĝusta traduko sekve estas: „Ekkonu vin mem“.

Behrendt

Ĉu „majstrokantistoj“?

En no. 11 de G. E. s-ro Ellersiek sur paĝo 174 iom okupas sin pri la ĝusta traduko de la germana vorto „Meistersinger“ kaj kontraŭbatalas la proponitan de s-ro Minor tradukon „minstreloj“. S-ro E. estas tute prava; mi havas la saman opinion, ke ĝenerale ni povas esti kontentaj pri la ĝisnuna formo „majstrokantistoj“. Tamen ekzistas, almenaŭ por mi, nun „Sed“. Laŭ mia opinio la formo „majstrokantistoj“ ne respondas al la vera senco de la germana esprimo „Meistersinger“, ĉar ĝi erare supozigas ĉe Hans Sachs kaj kunuloj majstrecon de poetoj-kantistoj. Tio estas malĝusta. Kvankam la Hans Sachs-oj certe estis ankaŭ ielaj majstroj en ĉi-supra metio, tamen la esprimo „Meistersinger“ volas komprenigi nur, ke tiuj personoj estis majstroj en iu gildo (ŝuisto — Sachs, orajisto — Logner ktp.) kaj samtempe poetoj-kantistoj. Tion pravas ankaŭ Stolzing, kiu devis rezigni sian nobelecon kaj aspiri sian engildigon. Tial la ĝusta traduko estas laŭ mia opinio „majstroj-kantistoj“. Mi estus tre scivolema, ĉu iu povas pruvi al mi la malon.

D-ro *Adolf Halbedl*, Graz

Ĉu oni pensas en lingvo?*)

Mi ne estas la psikologo serĉita de s-ro von Lidl, nur homo kun — kiel mi kredas — sana homkompreneco.

Mi memoras ke, kiam mi lernadis la francan lingvon, ofte mia instruisto postulis: Vi devas pensi franclingve. Kontraŭ tiu postulo protestis mia interno, kaj mi respondis: Tion mi ne povas nek iu ajn lernanto, tion povas nur perfektulo aŭ franco mem. Hodiaŭ mi dirus, nek perfektulo nek eĉ franco. La tiel dirita „pensado en lingvo“ estas nur ŝajna, estas trompiĝo. Oni ne pensas en vortoj, sed en imagoj; la cerbo transformas ilin en vortojn tiel rapide, ke oni *kvazaŭ* pensas en vortoj. Ju pli perfekte iu posedas lingvon, des pli rapide ĉe li okazas tiu ĉi procedo. Estas vere, ke ankaŭ inverse vorto aŭdita elvokas imagon; sed tiu ĉi procedo estas la duagrada; ĝi prezentas la inverson de la unua.

Neniu pridubas, ke ankaŭ la bestoj pensas, pripensas. Ĉu oni asertos, ke ili, ekzemple la hundoj, pensas en lingvo (eble en mondhundlingvo)? Ho ne, ankaŭ ili pensas en imagoj, kiujn ili poste igas aŭdeblaj per sia konata vaŭvaŭo.

Rippel, Würzburg

*) Vidu G. E. p. 204 en No. 12/1923.